

N° 146

30 juin
2009

trimestriel
2-ème
trimestre
2009

LA INFORMILO

l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières



esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant

les départements

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

" Philippe Desforges "

27, rue de la République

FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara

14 €

eksterlando

18 €



... dum la granda esperanto-parado
tra la urbo ...

photo André Grossmann

Willkommen !... Bonvenon !...

Herzberg-am-Harz – die Esperanto-Stadt... la ville-Espéranto en effervescence i

C'est en 2006 que la ville de HERZBERG, sous l'impulsion de son maire, Gerhard Walter et de son Conseil Municipal tout aussi motivé, prend officiellement le nom de *Herzberg – die Esperanto-Stadt*, laquelle devient alors rapidement un centre culturel important pour la promotion de la langue internationale.

C'est ainsi que du 28 mai au 3 juin 2009, plus de 400 espérantophones envahissaient la cité pour participer au 83-ème Congrès de l'Association Allemande d'Espéranto, couplé cette année au 8-ème Congrès de l'Union Européenne d'Espéranto.

Les débats se sont déroulés au milieu d'un festival urbain quasi permanent auquel se mêlaient de nombreux groupes et associations spécifiques. Citons entre autre le "choeur parlementaire" de Budapest, les danseuses et jeunes gens de la ville jumelle de Gorá (Pologne), sans oublier les pompiers et les chasseurs en costume de fête.



Espéranto France-Est	esperanto France-Est	Orient-Franca Esperanto-Asocio.	
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la Internacia lingvo ESPERANTO	
Rédaction: Redaktoro:	PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC		
	tel. (+33) 03.29.79.01.44 poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines	avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.			

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	03.29.79.01.44	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@mageos.com
Asesseeurs	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	03.87.60.23.66	mirantur@hotmail.com

Abono al La Informilo →	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE N° 146

p. 2	ours	19	congrès Troyes
3	édito	20	Nancy-54
4/5	U. E. A	21	hist traduction..
6	I.K.U.E	22	réinsertion et Eo
7/8	stage automne	23/24	progr Hurstel
9/10	EDE et Strasbourg	25	globalismo
11	presse	20/29	kaléidoscope
12	stage Nilvange	30	anecdotes
13/16	stage Landersen	31	page détente
17/18	rapport PSI	32	photothèque

ISSN 0291 6037 trimestriel

bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
Esperanto France-Est
MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République
54000 NANCY

Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**
Rédacteur : **PoI DENIS**
Dépôt légal : **31 mars 2005**
Imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole
Place de l'Ecole Normale, 55000 BAR-le-DUC
N° CPPAP : **0409 G 83517**

Karaj gefederaciaoj,



Estinte jam prezidanto de *Esperanto France-Est* ne estis vera surprizo, kiam la ĉeestintoj de la Komitatkunsido sekvinta la Ĝeneralan Kunvenon de nia asocio insiste petis, ke mi denove akceptu la prezidantecon pro la deziro de Sinjoro Gilbert STAMMBACH ne rekandidatiĝi pro troa profesia laboro.

Sciu, ke neniam, antaŭ tiu dimanĉa kunveno, tiklis min la deziro iĝi prezidanto, matene dum mi razis min !!! Miaj nuraj pensoj iris al la multnombraj ebloj interese okupi miajn tagojn dum mia baldaŭa emeritiĝo ! Sed bedaŭrinde ne svarmas la kandidatoj por la prezidanteco !!!

Jen do ! Miaj kunkomitatoj proponis al mi okupon ! Mi do akceptu !

Mia unua prezidanta mesaĝo estos do danko al Sinjoro STAMMBACH pro la farita laboro. Tre verŝajne li plupartoprenos la laboron en la dinamika strasburga grupo.

Cetere : en tiu ĉi numero de nia revuo vi trovos alvokon de Sinjoro Cyrille HURSTEL cele al praktika uzo de Esperanto en turismo. Tian agadon ni nepre subtenu kaj mi proponas, ke ĉiuj interesatoj faru siajn proponojn. Do : ek al la laboro !

Edmond LUDWIG


esperanto
France-Est

Priatentu ! En ĉi-tiu bulteno, malkovru informojn kaj aliĝ-slipon pri nia "66a regiona staĝo", kupligita kun la kvina *Mozellanda Esperanto-Semajnfino*, en kunlaboro kun *Luksemburga Esperanto-Asocio (LEA)* kaj *Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo (BAVELO)*...

25 / 27ajn de septembro 2009

MARIENBURG

apud Zell / Mosel - Rheinland / Pfalz
(en iama kastelo nomata "Marienburg")



... ankaŭ nepre vizitinda la novan retejon pri historio de nia Federacio
<http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>
tutsame atingebla ĉe nia kutima retejo...

Aktualigitaj informoj pri estontaj aranĝoj, fotoj pri okazintaj eventoj estas daŭre troveblaj ĉe
<http://esperanto.alsacelorraine.neuf.fr>

Ĝi estas la retejo de nia asocio, informas pri ĝiaj aktivecoj, pri la lokaj grupoj kaj pri Esperanto


Multaj ligoj ebligas rapide trovi aliajn interesajn retejojn en Francio kaj en la mondo

pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



**nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**





Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 327
2009-05-15



UEA LANĈIS RETAN FILMJURNALON

La 15-an de majo 1998 estis dissendita la unua numero de *Gazetaraj Komunikoj* de UEA. Precize 11 jarojn poste, la populara novaĵservo ricevis aŭdvidan kunulon, kiu nomiĝas "UEA viva". Temas pri 10-minuta filmjurnalo en *YouTube*, kun mallongaj raportetoj pri aktualaĵoj en la vivo de UEA, TEJO kaj de la *Centra Oficejo*. Ĉiufoje oni prezentas ankaŭ novaĵojn en la *Libroservo*. Komence oni planas prepari "UEA viva" kun intervaloj de unu-du semajnoj. Gazetaraj Komunikoj plu aperos kiel antaŭe.

La lanĉo de la reta ĵurnalo "UEA viva" estas nova paŝo en la plivastiĝanta utiligo de modernaj komunikrimedoj en la agado de UEA, kiun antaŭvidis la Strategia Laborplano de la Asocio. Komence de majo UEA funkciigis retan kinejon

en *Ipernity*, kie jam estas videblaj ok filmoj pri la programeroj de la aprila *Malferma Tago* kaj du historiaj dokumentoj pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959. Iom post iom la kolekto de la reta kinejo estos plivastigata per aliaj filmoj.

La ĵurnalo "UEA viva" troviĝas en: <http://www.youtube.com/UEAviva>

La reta kinejo troviĝas en <http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

Por aŭtomata senpaga ricevado de *Gazetaraj Komunikoj* oni povas registriĝi kiel abonanto ĉe <http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/index.html>

La aper-ritmo de numeroj de "UEA viva" kaj de novaj filmoj en la reta kinejo dependos de ilia populareco. Mi invitas vin regule rigardi ilin kaj diskonigi ilin. Oni povas finance subteni la produktadon de tiuj novaj servoj per donaco al la konto "video" ĉe UEA.

Koran dankon !

Gazetaraj komunikoj mailing list

Gazetaraj_komunikoj@retlistoj.uea.org

http://co.uea.org/mailman/listinfo/gazetaraj_komunikoj

Foto: Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, prezentas la novan filmjurnalon en *Yahou Tube*



Oficialaj Informoj de Akademio de Esperanto

Numero 12 - 2009.05.04.

Listo de Rekomendataj Landnomoj

En 1989 la Akademio de Esperanto publikigis dokumenton kun la nomo *Listo de Normaj Landnomoj* (Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 9). Tiu ĉi Listo de Rekomendataj Landnomoj estas ĝisdatigita kaj reviziita versio de tiu dokumento. **Tiu ĉi nova versio anstataŭas la malnovan.**

Same kiel la malnova versio, **tiu ĉi listo ne estas deviga**. Ĝi estas rekomendo. Sed ĝi enhavas kelkajn nomojn kun landaj aŭ popolaj radikoj oficialaj aŭ eĉ Fundamentaj. Pri tiuj nomoj oni atentu speciale.

La *Listo de Rekomendataj Landnomoj* ne konsistigas oficialigon de landnomoj aŭ popolnomoj. La Akademio povas je bezono revizii kaj ĝisdatigi la liston.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro,
Bertilo Wennergren

Tiu ĉi *Listo de Rekomendataj Landnomoj* estis aprobita de la Akademio en Marto 2009. Vidu la Oficialajn Informojn Numero 11 - 2009 04 15.

Bv. noti, ke sendependeco de lando ne estis kriterio por enmeti landon en tiun ĉi dokumenton. La listo enhavas ĉiujn nomojn de membroŝtatoj de *Unuiĝintaj Nacioj* kaj aldone ankaŭ la nomojn de kelkaj aliaj landoj, sed tio nenion diras pri la eventuala sendependeco de tiuj landoj. Fakte pluraj el la landoj, kiuj aperas en la listo, ne estas sendependaj, ekzemple Siberio kaj Anglujo, sed pri tiaj demandoj la Akademio de Esperanto ne alprenas starpunkton.

La dokumento *en formato pdf* estas trovebla ĉe:

http://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/listo_de_rekomendataj_landnomoj/Oficialaj_Informoj_de_AdE_-_numero_12_2009_-_Listo_de_Rekomendataj_Landnomoj.pdf



La Estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kun ĝojo anoncas kaj informas, ke ĝi venis al la decido, ke la 66-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazu en *Los Cocos, Santa Cruz del Norte, KUBO*.

Post longa kaj serioza diskutado pri ĉiuj alvenintaj kandidatiĝoj, esperantistoj el Kubo montris la plej taŭgajn kondiĉojn.

IJK okazos de la 24-a ĝis la 31-a de julio en 2010, tuj post la Universala Kongreso

Pliajn informojn pri la 66-a IJK la Estraro donos dum la venontaj monatoj.

Federico

TEJO-volontulo

Poŝtmarko pri la 100-jara UEA



Okaze de la 93-a UK en Roterdamo, UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun la kongresa simbolo. Ĝi fariĝis grandega sukceso kaj praktike elĉerpiĝis jam dum la UK. Malgraŭ multaj petoj, ĝi ne estis reeldonita, ĉar post la paso de la UK ĝia temo ne plu estis aktuala. Nun, ĝi estas ŝatata objekto ankaŭ ĉe ne-esperantistaj kolektantoj, kiuj en retaj aŭkcioj pagas por ĝi multe pli altan prezon ol la originala vendoprezto.

La furoro de la kongresa poŝtmarko tamen instigis UEA mendi novan markon pri temo, kiu ja ankoraŭ aktualas: **la jubilea jaro de UEA**. La nova marko aperis en novembro kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por ordinara letero en Nederlando. Ĝi montras la jubilean simbolon de la 100-jara UEA, desegnititan de Guillem Sevilla, kun la teksto "*100 jaroj universala esperanto-asocio*".

La jubilea poŝtmarko estas vendata en folioj de 10 markoj kaj ĝi estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas 5,50 EUR (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla). Ankaŭ tiu ĉi marko estis eldonita en tre limigita kvanto.

el gazetaraj komunikoj de UEA ---- fonto: *Ret-Info* <http://www.eventoj.hu>

... kie kaj kiam somerumi multfacete en internacia etoso ? ...

Vizitu tutsimple la serĉ-motoron "google" kaj premu sur via klavaro la du vortojn

esperanto kalendaro

tiam vi ricevos la plej ampleksam panoramon de la proponitaj renkontiĝoj sur la terglobo, nerefutebla pruvo de la vivanteco de nia lingvo !


... kiu aŭdacus pretendi, ke esperanto ne havas kulturon?...

Internacia Kongresa Universitato en Bialistoko: kremo el 30 proponoj

La membroj de la UEA-komisiono pri la **Internacia Kongresa Universitato** havis ĉi-jare nekutime multe da laboro, ĉar ili devis ekspertizi entute 30 prelegproponojn por la **62-a sesio de IKU** en la 94-a UK en Bjalistoko (25 julio – 1 aŭgusto 2009). La Estraro de UEA, kiu aprobis la finan programon de IKU, sekvis la rekomendon de la Komisiono.

La Bjalistoka IKU-sesio konsistis el jenaj prelegoj:

- **Tomasz Chmielik:** *"Kvin urboj de fratoj Goskind"*
- **Barbara Despiny:** *"Pol-litova Unio: respubliko de multaj nacioj"*
- **Nicolau Dols Salas:** *"Perspektivoj en fonetika kaj fonologia esplorado de Esperanto"*
- **Mark Fettes:** *"Ĉu eblas kultivi imagipovon? Enkonduko en radikalan edukteorion kaj praktikon"*
- **Mauro La Torre:** *"Nombrado: ila, vorta, cifera"*
- **Árpád Máthé:** *"Esperantistaj redaktoroj de Zamenhof kaj aliaj pioniroj ĝis la nuntempaj"*
- **Otto Prytz:** *"La invento de la jubileulo Louis Braille - daŭrigebla kaj daŭriginda"*
- **Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki):** *"Socilingvistika komparo de du diasporaj lingvoj, la jida kaj Esperanto, en Interreto"*
- **Amri Wandel:** *"Teleskopoj - de Galileo ĝis la spacteleskopo"*



La prelegoj de *Nicolau Dols Salas*, *Tsvi Sadan* kaj *Amri Wandel* estos samtempe kursoj de **Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)**. La kunlaboro inter IKU kaj AIS komenciĝis en la Tamperea UK en 1995. Ĉiu dumkongresa AIS-kurso konsistas el tri prelegoj, el kiuj la unua estas IKU-prelego, sekvata de du daŭrigaj prelegoj, en kiuj la preleganto prezentas sian temon pli profunde kaj vaste.

La prelegtekstoj aperos kiel t.n. **IKU-libro**, lanĉota en la UK. En la Libroservo de UEA estas ankoraŭ haveblaj IKU-libroj de kelkaj antaŭaj jaroj. Pluraj IKU-libroj kaj la resumoj de la ĉi-jaraj prelegoj estas

konsulteblaj ankaŭ en la kongresa retejo: <http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html>

Gazetara Komunikado de UEA

nova podkasto

Karaj,



RSS

Ekde la 8-a de marto 2009, ankaŭ la E-elsendoj de **Radio Vatikana** estas aŭskulteblaj *podkaste* - aldone al la aliaj "tradiciaj" elsendomanieroj.

La servon oni povas aboni ĉi tie:


http://www.radiovaticana.org/it1/on_demand.asp?gr=esp

Viaj reagoj, rimarkoj kaj komentoj estos bonvenaj.

Se oni deziras subteni la ĉeston de E-o en Radio Vatikana, prefere oni adresu mesaĝojn nacilingve al la direkto de la Radio:

dirpro@heliko.vatiradio.va

Amike,
Carlo Sarandrea
el [sce, soc.culture.esperanto]

<p>Kvina Mozellanda Esperanto Semajnfino (MES) sur Marienburg apud Zell/Mosel en Rejnlando-Palatinato 25a/27a de septembro 2009</p>	<p>66a regiona staĝo de </p>
<p>en kunlaboro kun Luksemburga Esperanto-Asocio (LEA), Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo (BAVELO) kaj Esperanto France-Est</p>	<p>66ème stage régional d'espéranto à Marienburg près de Zell/Mosel en Rhenanie-Patatinat en Allemagne 25 au 27 septembre 2009</p>
<p>Kursoj kaj laborgrupoj: Kurso A por komencantoj (Martin Brüggemeier) Kurso B por komencintoj (Edmilson Lima Serejo el Brazilo) Kurso D diversaj prelegoj</p> <p>Prezoj: Partopren-kotizo por la semajnfino: 35 € Por eksterlandanoj kaj GEA-membroj: 25 € Por gejunuloj malpli ol 27 jaroj: 10 € GEJ-membroj kaj junuloj el eksterlando: 0 € Partatempuloj pagu la plenan kotizon.</p> <p>Tranoktoj kun kompleta pensio: 60 € por du noktoj (du matenmanĝoj, du tagmanĝoj kaj du vespermanĝoj) Rabato por gejunuloj kaj familioj kun infanoj laŭ niaj financaj ebloj.</p> <p>Unuopaj manĝoj: tag- aŭ vespermanĝo: 10 € Bonvolu pagi surloke kontante!</p> <p>Programo: Vendredo, la 25a de septembro 2009 18.00 h vespermanĝo 19.00 h interkona vespero Sabato, la 26 de septembro 2009 9.00 h – 12-30 diversaj kursoj 12.30 h tagmanĝo 14.00 h ekskurso al la bierfarejo <i>Kloster Machern</i> apud <i>Zeltingen</i> 18.00 h vespermanĝo 19.00 h diservo en Esperanto 20.15 h vespera programo: bierseminario el la lando de la 1500-bieroj de Marc Vanden Bempt el Lovenjo Dimanĉo, la 27a de septembro 2009 9.00 h prelego "Kiel paroligi lernantojn uzante lernolibron?" de Josef Schiffer 12.30 h tagmanĝo 14.00 h fino de la staĝo</p>	<p>Cours et groupes de travail: Cours A pour débutants (Martin Brüggemeier) Cours B pour débutants ayant déjà commencé un cours (Edmilson Lima Serejo) Cours D différentes conférences</p> <p>Prix Cotisation : pour la fin de semaine : 35 € Pour les étrangers et membres de GEA: 25 € Pour les jeunes de moins de 27 ans: 10 € Pour les jeunes étrangers et membres de GEJ: 0 € Même cotisation pour une participation partielle.</p> <p>Nuitée avec pension complète: 60 € pour 2 nuitées (2 petits déjeuners, 2 déjeuners et 2 dîners) Réduction pour jeunes et familles avec enfants selon nos possibilités financières.</p> <p>Repas sans nuitée: 10 € à payer sur place.</p> <p>Programme: Vendredi le 25 septembre 2009 18h00 Dîner 19h00 Bienvenue, faisons connaissance Samedi le 26 septembre 2009 9h00 Cours et conférences 12h30 Déjeuner 14h30 Excursion à la brasserie <i>Kloster Machern</i> près de <i>Zeltingen</i> 18h00 Dîner 19h00 Messe en espéranto 20h15 Soirée: Löwen le pays aux 1500 bières, présentation par Marc Vanden Bempt Dimanche le 27 septembre 2009 9h00 Conférence en espéranto par Josef Schiffer avec présentation de son livre d'étude 12h30 Dîner 14h00 Fin du stage</p>

Aliĝilo/ Bulletin d'adhésion

Mi/ni aliĝas al la 66a regiona staĝo de **Esperanto France-Est.**J'adhère/nous adhérons au 66^{ème} stage de **Esperanto France-Est**

	Familia nomo Nom de famille	Persona nomo Prénom	Naskiĝdato Date de naissance	Kurso Cours	Vegetarano Végétarien
1					
2					
3					
4					
5					
Adreso / Adresse					
Ret-adreso: / Courriel:			@		
Deziroj pri ĉambroj			Souhaits pour les chambres		
1-lita, 2-lita, plur-lita			à 1 lit, à 2 lits, à plusieurs lits		
Mi mendas (metu kruceton)			Je commande (mettre une croix)		
		vendredo/vendredi	sabato/samedi	dimanĉo/dimanche	
	Tagmanĝo / déjeuner				
	Vespermanĝo / dîner				
	Tranoktado / nuitée				
Kuntribuo al la programo:					
Dato / date		Subskribo / signature			

Nenia antaŭ-pago estas petata de la organizantoj, tial vi povas sendi vian aliĝilon al la jena adreso:	Esperanto Rheinland-Pfalz p.a. Wolfgang Bohr Johannes-Kirschweg-Str. 11 DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler Germanio
Aucun acompte n'est demandé par les organisateurs, vous pouvez envoyer directement votre bulletin d'adhésion à l'adresse ci-après:	telefono: 0049(0)2641/4885 ret-adreso/courriel: wolfgang.bohr@esperanto.de
La staĝejo estas iama kastelo nomata „Marienburg“ sur monteto en la valo de la rivero Moselo. La klerigejo situas en meandro de la rivero. Oni vidas la riveron je du flankaj de Marienburg. La plej proksimaj urboj estas Treviero (Trier) kaj Koblenco (Koblenz). Marienburg apartenas al la urbeto Zell, kiu proksimas al Wittlich. Eblas vojaĝi tien per trajno. La stacidomo Bullay estas ĉe la fervoja linio inter Treviro kaj Koblenco. De Bullay eblas promeni (3 km) al Marienburg. Ni ofertas transportservon de tie. Bonvolu anonci kiuĥore vi alvenos en Bullay.	Le stage aura lieu dans l'ancien château "Marienburg" sur une colline de la vallée de la Moselle, celui-ci appartient à la ville de Zell près de Wittlich. Les villes les plus proches sont Trêves et Coblenz. Il est possible de s'y rendre en train à Bullay à 3 km de Marienburg. Veuillez nous informer de votre arrivée en train jusqu'à Bullay pour le service transport.
Proponoj kaj sinproponoj por la lingvokursoj, la prelegoj kaj la laborgrupoj estas ne nur bonvenaj, sed necesaj!	



Europe Démocratie
espéranto



Europe Démocratie Espéranto a présenté la plus jeune tête de liste de France

Sur les 161 listes de candidats aux élections européennes validées par le Ministère de l'intérieur, le prix de la jeunesse est revenu à la liste **Europe Démocratie Espéranto** de la circonscription Est. Sa tête de liste était **Fabien Tschudy**, 26 ans. Ainsi, *Europe Démocratie Espéranto* a présenté la plus jeune tête de liste de France.

Fabien Tschudy, animateur scientifique à Strasbourg, a suivi les premiers pas du mouvement *Europe Démocratie Espéranto*, dès 2004, mais sans pouvoir être lui-même candidat : ne peuvent être candidats que les électeurs âgés de plus de 23 ans. En 2009, il se lance dans la campagne et accepte d'être tête de liste dans sa circonscription électorale, l'Est, qui réunit l'Alsace, la Bourgogne, la Champagne-Ardenne, la Franche-Comté et la Lorraine. Son objectif : *"faire d'une langue commune indépendante, riche, et équitable - l'espéranto - le ciment de la citoyenneté européenne et la clé de voûte d'un multilinguisme équilibré"*.



A noter : **Europe Démocratie Espéranto** était également l'un des rares partis à présenter des listes dans toutes les circonscriptions françaises, en France métropolitaine comme en Outre-Mer. Seules 7 formations politiques y sont parvenues.

— Ili kandidatiĝis ! —

- 01- Fabien **TSCHUDY** (67, Strasbourg)
- 02- Catherine **KREMER** (57, Hettange-Grande)
- 03- Bruno **SCHMITT** (68, Lapoutroie)
- 04- Simone **DUBY** (88, Fraize)
- 05- Daniel **CANO** (54, Mont-Saint-Martin)
- 06- Anne **MASALA** (57, Metz)
- 07- Hippolyte **NEUVILLE** (10, Troyes)
- 08- Claude **NOËL** (88, Gérardmer)
- 09- Dominique **JACQUIN** (21, Beaune)
- 10- Berthe **CHOULET** (25, Villirs-Grelot)
- 11- Laurent **PHILIPPE** (10, Sainte-Savine)
- 12- Simone **KIRY** (68, Battenheim)
- 13- François-Xavier **GILBERT** (55, Void-Vacon)
- 14- Geneviève **MARTIN** (88, Saulxures-sur-Moselotte)
- 15- Thomas **CORDONNIER** (57, Thionville)
- 16- Marie **HURSTEL** (67, Obernai)
- 17- Alexandre **WEBER** (67, Strasbourg)
- 18- Joëlle **CUNNAC** (71, Mesvres)

Ne pas être une tour de Babel... (?)



Avec 23 langues officielles, le Parlement est une ruche linguistique où une nuée d'interprètes et de traducteurs est nécessaire. Pour que ses travaux soient accessibles aux élus comme aux citoyens.

On l'ignore souvent : le Parlement européen est le **plus gros employeur d'interprètes et de traducteurs du monde**.

Le **tiers du budget du Parlement** est d'ailleurs consacré à ce qui, sans eux, serait une tour de Babel.

Le Parlement travaille avec **23 langues officielles** ce qui donne **506 combinaisons linguistiques** possibles... Pendant les sessions plénières à Strasbourg, **un millier d'interprètes** de conférences, habilités à **traduire en direct** les débats

(contrairement aux traducteurs qui travaillent sur une matière écrite), sont nécessaires..

Cette situation peut paraître aberrante. Par exemple, l'ONU qui réunit tous les États de la planète ne reconnaît que six langues officielles (arabe, chinois, anglais, espagnol, français et russe) contre 23 dans l'UE.

Mais cette apparente cacophonie linguistique reflète aussi la volonté politique à la base de la construction européenne : unir sans uniformiser en gardant toutes les identités culturelles..


C'est aussi une volonté de transparence et d'égalité démocratiques : du côté des citoyens, le travail de l'Union doit pouvoir être compris par tous, quant aux députés, il ne serait pas équitable d'imposer comme critère d'éligibilité de maîtriser une langue étrangère, si ce n'est plusieurs...

Mais dans les faits, **l'anglais domine de loin**, même si les rapports, textes et interventions sont traduits dans tous les parlars officiels de l'UE. Et la part du français recule au fur et à mesure que s'élargit l'UE.

Les députés et fonctionnaires d'Europe centrale et orientale sont surtout anglophones, également les Roumains surtout représentés à Strasbourg par les jeunes générations qui ont abandonné la traditionnelle étude du français **au profit de l'anglais**. Et dans les couloirs et les bars parlementaires, les interprètes ne sont plus là pour prêter main forte !...

L'anglais est aussi la principale « langue-pivot » : **une langue peu parlée est d'abord traduite par l'interprète en anglais et ensuite retraduite dans une autre langue**. Par exemple, le letton est traduit en anglais et de l'anglais en grec, magyar ou slovène...

Par ailleurs, le Parlement européen utilise trois alphabets : le latin, le grec et, depuis 2007, le cyrillique pour les Bulgares...



LE 7 JUIN, CHANGEONS L'EUROPE AVEC

EUROPE DÉMOCRATIE ESPÉRANTO


renovigo de la eùropa parlamento
voĉ-donado – orient-franca regiono

- | | | |
|-----------------------|-----------------------------|---------------------|
| 1. Fabien TSCHUDY | 9. Dominique JACQUIN | 17. Alexandre WEBER |
| 2. Catherine KREMER | 10. Berthe-Marie CHOULET | 18. Joëlle CUNNAC |
| 3. Bruno SCHMITT | 11. Laurent PHILIPPE | |
| 4. Simone DUBY | 12. Simone KIRY | |
| 5. Daniel CANO | 13. François-Xavier GILBERT | |
| 6. Anne MASALA | 14. Geneviève MARTIN | |
| 7. Hippolyte NEUVILLE | 15. Thomas CORDONNIER | |
| 8. Claude NOËL | 16. Marie HURSTEL | |



balot-bulteno





Le regard de la presse

L'espéranto veut aussi se faire entendre



Le mouvement *Europe Démocratie Espéranto* a proposé des listes en France et une en Allemagne. Son objectif : faire connaître la « langue de la paix ».

Présentée lors d'une conférence de presse à Strasbourg, la campagne pour les élections européennes d'Europe Démocratie Espéranto (EDE) veut promouvoir cette langue dans l'Union.

« L'objectif est d'avoir une langue de travail qui permette les débats », a expliqué Cyrille Hurstel, chargé des relations extérieures pour la France.

Déjà présent lors des dernières élections européennes où il avait récolté 25 000 voix en France, le mouvement espère mieux faire connaître l'espéranto, langue forgée par le docteur Zamenhof en 1887 à Varsovie. Huit listes ont été présentées en France et une en Allemagne menée par Reinhard Selten, prix Nobel d'économie.

Sur un pied d'égalité

« Nous sommes capables, grâce à notre nature transfrontalière, de faire parler et de faire discuter tous les citoyens de l'Union européenne, pas seulement sur des thèmes nationaux, mais aussi sur des thèmes vraiment européens », explique le Strasbourgeois Fabien Tschudy, animateur scientifique de 26 ans et tête de liste pour l'Est. « Pour construire une union politique et économique, il faut que nous soyons sur un pied d'égalité », estime Isabel Castro. « Or l'effet pervers du "tout anglais" dans les relations internationales est de toujours privilégier les anglophones ».

Des soutiens à droite et à gauche

Un problème qui se pose aussi dans le domaine de la publication des recherches scientifiques, selon Cyrille Hurstel. Hormis la volonté de poser l'espéranto, surnommée « la langue de la paix », comme un moyen de communication, l'EDE n'a pas de projet politique précis. « L'espéranto fait partie des thèmes de la liste Europe Écologie, mais nous avons des soutiens à droite comme à gauche », a souligné Fabien Tschudy.

D'après un article paru dans DNA sous la signature de Sailesh Gya **SURFER** www.europe2009.fr

Les espérantistes en congrès à Troyes

Pour fêter dignement ses trente ans d'existence et en collaboration avec *Espéranto-France*, l'association *Espéranto 10* s'est offert l'énergie d'organiser le congrès national interassociatif de l'espéranto en France. Une première qui résonne au Centre sportif de l'Aube (CSA) dans des intonations inhabituelles depuis jeudi soir : on s'y exprime essentiellement, ou presque, dans la langue de Zamenhof.

Quelque cent dix congressistes sont là, représentants des diverses fédérations et associations françaises, et aussi des voisins d'Allemagne, du Luxembourg et de la Belgique flamande. Tous sont venus là pour partager leurs expériences, leurs connaissances, leurs souhaits, leurs idées. L'ambiance est au beau fixe, à la fois studieuse et détendue, laborieuse et festive. Au programme de ces assises qui se termineront lundi, des conférences, des réunions informatives, des ateliers, des moments loisir, dont des visites proposées dans la ville et à la campagne, et, obligé, une petite partie statutaire.

Hier matin, l'inauguration officielle a réuni la quasi-totalité des participants dans l'amphithéâtre du CSA. Michèle Guingouin, présidente d'Espéranto 10, a délivré son message de bienvenue en présence de Xavier Dewidehem, président d'Espéranto France, Marc Sebeyran, maire adjoint de Troyes, et Christiane Berthelot, conseillère en charge du Comité de jumelage.

Le président Dewidehem s'est dit très "... heureux d'être aussi bien accueilli. C'est une ville magnifique. Nous sommes venus ici pour éclairer nos relations, coordonner les initiatives des associations, notamment en matière d'enseignement de l'espéranto. Il faut aussi faire avancer les choses en ce qui concerne sa diffusion et les échanges ".

Marc Sebeyran a rappelé pour sa part "... l'espoir d'un monde meilleur contenu dans le mot espéranto [... ...] C'est la seule tentative de langue mondiale qui ait connu un tel essor. Elle représente de nombreuses valeurs, valeur de solidarité, d'entraide et de partage entre les hommes, valeur de démocratie, valeur des droits de l'homme ".

C'est dans cet esprit qu'Élisabeth Barbay (Ile-de-France) sera tête de liste d'Europe Démocratie Espéranto, un parti apolitique, aux prochaines élections européennes.

— SUCCES DU STAGE DE LANGUE INTERNATIONALE A NILVANGE —

16 / 20 mars 2009

Pour une première, ce stage organisé par les associations *Esperanto-Thionville* et *l'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto* est un succès. Pas seulement pour le nombre, 20 personnes de la vallée de la Fensch et de ses environs, de Toulouse et de la région parisienne, succès également par la diversité et la richesse de son programme qui a ravi et comblé les participants.



Le matin, trois groupes de personnes motivées et volontaires ont suivi les cours d'espéranto. Les débutants avec *Marcel Redon* ont pu découvrir la langue internationale et acquérir ses bases. Pour les plus initiés avec *Bernard Vivier*, ils se sont perfectionnés, et ont approfondi certains points de grammaire, qui est bien plus simple logique et surtout sans exception en comparaison à toutes les autres langues, ce qui permet de l'apprendre 5 à 7 fois plus rapidement et efficacement que l'anglais. Ils ont aussi pratiqué l'oral. Le troisième groupe avec *Catherine Kremer* a pu échanger en Espéranto sur le tourisme et tout les sites intéressants à voir dans notre région et ses alentours: patrimoine

architectural, industriel et artistique.

Pour la détente, l'après-midi étaient proposées des visites guidées avec Catherine Kremer, en espéranto et en français pour les débutants: *Luxembourg, Trêves, Thionville* et l'écomusée des mines de fer de Lorraine de *Neufchef* et pour finir *Metz*.

Le lundi soir, le *Forum des Citoyens* représenté par *Michel Dourson* son président a chaleureusement accueilli les participants en leur montrant un diaporama sur la vie à Nilvange et à la *SMK, Société Métallurgique de Knutange*, depuis la guerre jusqu'aux années 1970. Les soirées suivantes, des films de voyage présentés par deux espérantophones *Marie-José Behm* et *Bernard Vivier* ont été projetés: un sur la Hongrie, l'autre sur le Japon et le 92ème congrès universel d'espéranto à *Yokohama* qui a eu lieu en 2007 avec plus de 2000 participants de plus de 100 pays au monde. Les congressistes ont dialogué entre eux directement, grâce à la langue internationale, sans aucun besoin d'interprète.



Le jeudi soir, la chanteuse Anjo (Anio) AMIKA, soprano espérantophone de Budapest, nous a offert un magnifique récital de chansons très variées interprétés par sa voix mélodieuse. Ce concert, ouvert au public, a été coorganisé avec le Forum des Citoyens. Les stagiaires ont pu discuter avec cette artiste sur différents sujets grâce à cette langue-pont qu'est l'espéranto.

L'ambiance était joyeuse et amicale. Le soleil était de la partie ainsi que l'amabilité et le sourire des personnels du *Centre Socioculturel Albert Camus* où a eu lieu les cours et la partie culturelle, et aussi ceux du foyer-accueil du château qui nous ont assuré un hébergement et une

restauration de grande qualité. Tout cela a donné l'envie aux participants, aux organisateurs et animateurs, de prendre rendez vous ici à Nilvange en 2010. D'autres sites et lieux, digne d'intérêts à visiter de notre belle région ne manqueront pas d'attirer des stagiaires pour l'année prochaine.

« *Ĝis la venontan jaron !* »

Renseignements: Tél. 03 82 53 25 47

Courriel: esperanto-thionville@laposte.net

Site web: <http://www.esperanto-thionville.ass0.fr>

Bruno HENRY

65a Regiona Staĝo de
organizita de

esperanto

France-Est

MULHOUSE  **ESPERANTO**

Edmond skribas

La propono, organizi printempan staĝon de Esperanto-France-Est, venis de André GROSSMANN. Tuj li proponis Lucelle (kie li jam organizis sukcesan staĝon) kaj Landersen en la valo de Munster. Ĉar mi estis leginta kelkajn tagojn pli frue, ke la feriejo de Landersen estas de nun estrata de eksa dinamika lernantino kaj ties edzo, mi anoncis al André, ke mi enketos pri la kondiĉoj. Sed necesis rapidi, ĉar restis nur kelkaj liberaj semajnfinoj dum la printempa periodo. Pro aliaj aranĝoj kaj personaj kialoj, restis nur la antaŭlasta semajnfino de marto. Ek do ! Malgraŭ miaj iomaj hezititoj, ĉar je tiu dato ree povas fali neĝo en la montaro. Feliĉe mi ankoraŭ ne sciis, ke la vintro estos severa ! Kiel vi konstatis, ni bonŝancis, ĉar la vetero ja belegis, eĉ se la temperaturoj malaltis !

Ni anoncis kvindek da staĝanoj kaj André kalkulis buĝeton laŭ tiu meza nombro. Ni diru tuj, ke ni komencis paniki, kiam tri semajnojn antaŭ la staĝo aliĝis nur... 30 gesamideanoj ! Sed antaŭaj staĝo-spertoj esperigis pri rapida pliigo ĝis la lasta semajno antaŭ la aranĝo, kio feliĉe okazis : ni ja preskaŭ atingis sesdek. La plejmulto alvenis aŭtomobile. Dank'al la loka TGV (Train de la Grande Vallée !!!!), kiu laŭ la momento de la tago eĉ ĉiun duonan horon veturas, sufiĉis atendi la gastojn en la proksima Metzeral. Kvankam André rete jam informis sendinte mapon, mi fiksas kelkajn esperanto-direktilojn vendrede matene.



Printempa pejzaĝo en Landersen

Agrable surprizis nin la fakto, ke vendrede jam venis 33 personoj, kiuj tranoktis kaj spektis la vesperan programon. Roberto rakontis sian vojaĝon al Togolando, komentante la fotojn projekciitajn. Alia talentulo de Mulhouse-Esperanto estis Frédéric, kiu bone plenumis siajn magiajn : lud-kartoj malaperis kaj reaperis, globetoj multiĝis, eĉ en la mano de spektanto, ktp.

El la Strasburga grupo venis Cyrille, kiu prezentis la novan DVD-on de UFE "Esperanto estas...", kiu tre moderne prezentas la uzoblecojn de Esperanto. Li donacis unu ekzempleron al ĉiu grupo. Ĝi ne celas anstataŭi la DVD-on "Langue équitable..", kiun oni povas vendi al publiko. "Esperanto estas...", ebligas prezenti la lingvon okaze de foiro....

Knajpaj vesperoj

Pli kaj pli post-programa knajpado iĝas tradicio. Se la vendreda vespero ne allogis multe da trinkantoj kaj babilemuloj, ne samis la sabata vespero. Feliĉe la bierstoko plene sufiĉis kaj Roberto, la knajpisto, estis okupata ĝis la tria matene, kio vidiĝis la venontan tagon sur lia laca vizaĝo !!!



Frédéric magias

Vizito de la SCHLITTE-Muzeo kaj de la ligno-ŝuista ateliero

Sabate matene mi atendis la interesiĝantojn por vizito al la Muzeo de la SCHLITTE, kie la uzteknikoj de tiu sledego uzita sur ambaŭ flankoj de la Vogezoj cele al transportado de tunoj da ligno al la valo. Kiom da stiristoj mortis akcidente ?

Sekvis vizito al la lignoŝuisto, kiu antaŭ la publika fabrikis paron da lignoŝuoj.

Ĉar la estrino de la staĝejo akceptis malfruigi la tagmanĝon je kvaronhoro, ĉiuj reatingis Landersen akurate.



Vizito al ligno-ŝuisto

Diversnivelaĵoj kaj prelego :

Pri la preteco gvidi kurson mi danku al Ginette MARTIN, kiu majstre uzas siajn neforgesitajn profesiajn pedagogiajn talentojn por trovi mezvojon inter lernado enĉambra kaj pli praktika lernado dumpromena ! Ni ja estis meze de la naturo kaj la vetero belis. Pli gramatikece deĵoris Roberto, klarigante al seso da ĝelernantoj la funkciadon de nia lingvo. Roberto ne estas instruisto, sed ja revis pri tia profesio !

Mi mem havis la plezuron paroli tiujn, kiuj deziri sin esprimi pli flue. Ĉar nur kvin partoprenis, tiuj kvin kvazaŭ devige sin esprimis kaj ne grumblis pro unu nura paŭzeto dum la pli-malpli 3 horoj. Cetere : kiu instruisto pri lingvo ne kontentas, kiam ĉiuj emas sin esprimi !

Mia bedaŭro estis, ke dume mi ne povis partopreni la prelegon de Kristin TYTGAT. Proe mi petis raporton de Bernard BEHRA.



Anjo kaj Kiki

atento kvazaŭ religia. Tiun etoson ankaŭ mi kundividis. Por vere ĝui muzikaĵon, necesas por mi, ke ĝi atingu mian koron, ke mi kunsentu, mi bezonas kortuŝan

muzikon ! Kaj mi konfirmas : **gracila ANJO** plej senteme interpretis kaj klasik-religiajn kaj pli grandpublikajn kantojn. Unufraze nur mi insistu pri la precizeco de ŝia alta voĉo ! Ĉiu ja scias, ke tiaj voĉoj ne permesas nur supraj ! La aplaŭdoj kaj la bisoj konfirmis la talenton. Koran dankon ANJO !

Honorigo al Pol DENIS

Dum la paŭzo la organiza skipo decidis honori kaj danki la longjaran redaktoron de LA INFORMILO, Pol DENIS. Ni ja ĉiuj senpacience atendas kvarfoje en la jaro la novaĵojn pri la vivo de nia regiona asocio. Pol mem ankaŭ diris, ke por li tutnormalas, ke li pretigas la bultenon, des pli ke li ĝojas, ke denove atingas lin personaj raportoj de gelegantaj agantaj kaj vojaĝantaj. Bildaro pri la longjara agado de Pol zorge kolektita en fotoalbumo estis perkomputile pretigita de André GROSSMANN. Pol sciu, ke ni konscias pri la laboro, kiu bezonatas por tia longdaŭra formika laboro. Estis precizigite, ke ni petas Pol daŭrigi por nia nun ne plu tiom egoisma plezuro !

Ĉe la fromaĝisto

Post agrabla dimanĉa kunmanĝado formiĝis impona vico da veturiloj, kiujn mi havis la plezuron gvidi tra la Granda Valo al Munster ĝis la Malgranda Valo por atingi bazan parkejon ĉe la eta vilaĝo Hohrod. Ni ne intencis suprengrimpi piede, sed pro la

malgranda nombro da parklokoj en la vilaĝo, apud la tradicia farm-domaro, necesis limigi la nombron de la veturiloj. Akceptis nin la juna farmisto, sinjoro LAU, kiu estas la nura farmisto en la valo, kiu nutras sian brutaron sole per freŝa herbo kaj natura fojno ! Eble vi demandas vin, ĉu ankaŭ ekzistas artefarita fojno !!! Ne, sed ekzistas **ensil-uja** herbo ! Kaj tiaj siluĵoj ne plu rajtas ekzisti en la vilaĝoj mem pro... laodoro. En ili oni konservas duonsekigitan herbon, al kiu oni aldonas « produkton » ! Tiel la herbo restas pli sukplena ! Sed vi aĉetis fromaĝojn tute naturajn ! Vi ja ne ŝatas artefaritajn... manĝaĵojn, ĉu ne ?

Videblis, ke li ŝatas sian profesion, ege dinamikas kaj kapablas komuniki, kiel vi tion konstatis. Mi esperas, ke la fromaĝo hejme bongustis.



Jean-Luc Thibias prezentas novajn librojn



Kantas Anjo



Pol kun foto-albumo



Ĉe la fromaĝisto

Bernard skribas

Ĉiufoje kiam mi partoprenas en esperanto-staĝo, mi revenas hejmen pli riĉa. Evidente temas pri la sola riĉeco, kiu valoras por mi : tiu de la penso, de la intelekto, do de la kapablo rigardi la vivon kaj la mondon kaj trovi signifon, sencon, nutraĵon por helpi min esti feliĉa kaj doni al mi eblecon helpi aliulojn veni, reveni, resti sur la vojo de la feliĉo. Por mi nur indas la filozofioj kaj la agoj, kiuj celas la feliĉon por ĉiuj homoj.

Mi do partoprenis en esperanta staĝo la 20-22-ajn de marto 2009, en alzaca valo de Munster-Metzeral. La staĝejo, en Lander-sen, estis agrabla kaj la pejzaĝo belega.

Mi antaŭe ne studis la programon, sed decidis sekvi la prelegon de Kristin TYTGAT, sen scii pri kio ŝi prelegos kaj kio estas ŝia fako.

Post la staĝo, Edmond LUDWIG petis min ion skribi pri tiu prelego: « Temas nur pri viaj impresoj. Ne necesas fari longan raporton. Mi ricevis multajn laŭdojn pri tiu ero de la programo. Pro tio interesas min ankaŭ via opinio. »

Ho ve, mi denove diris jes, eĉ se mi ne prenis notojn, eĉ se mi nur sekvis la sabatan prelegon. Mi malĉeestis la dimanĉan, ĉar mi estis devigita partopreni en familia agrabla evento.

Prelegis Kristin TYTGAT

La prelego de Kristin TYTGAT temis pri « Interkultura Dialogo ». Alidirite pri kultur-diferencoj kaj komunikado. La prelego metode esploris kondiĉojn por komunikado, specojn de komunikado, kultur-diferencojn, paŝojn al bona komunikado, neverban komunikadon, kulturajn ŝokojn.

La gestoj, la mimikoj, la manieroj esti, sinteni, manĝi, paroli, sin vesti, ktp. ankaŭ « parolas » kaj komunikas. Do evidentas, ke oni ne nur parolas per la buŝo.

Fari bruon manĝante estas konvena aŭ ne, laŭ kutimoj. En iu kulturo ia gesto estas sensignifa aŭ pozitiva, sed en alia ĝi povas esti insultema aŭ maldelikata. Do antaŭ internacia renkonto oni devas sin informi pri la moroj kaj la kutimoj kaj pri kio oni ne devas erari (paroloj, esprimoj, emocioj, ktp.) Dum interkultura renkonto oni devas esti atenta pri la gestoj, mimikoj kaj la maniero sin teni. Kiam venas malfacila situacio, oni ne hezitu humile peti konsilojn kaj informojn.



Pri la maniero kunlabori en internacia nivelo stariĝas multaj demandoj. Ĉu oni devas/ povas miksi aŭ ne la privatan sferon en internacia profesia kunlaboro ? Kio estas konvena aŭ ne ? Provante respekti malsamajn kulturojn, sed tamen provi kune progresi ĝis la interkonsentitaj celoj aŭ ne ?

Kiel trakti, diskuti pri la kondiĉoj de iu afero por finveni al interkonsento ? En iaj kulkuroj, por atingi valoran kaj sukcesan traktadon, konstruiga diskuto eblas nur post vera kaj eĉ kruda kverelo !

Kiam oni gastas aŭ gastigas, prefereblas diri, ĝis kio oni konsentas pri aliaj kutimoj kaj praktikoj, kaj diri tion, kio por si mem estas malfacila kaj tute ne akceptebla. Ekde la komenco de renkonto ofte utilas diskuti kaj proponi interkonsentojn pri komunaj agmanieroj kaj sintenoj dum la renkonto kaj/ aŭ la ĉeesto. Aŭ pli simple : tiu kiu akceptas gastojn devas informi ilin pri la praktikaj kutimoj en la domo. En ĉiu kazo, oni devas eviti suferi ĝis la situacio ne plu estas eltenebla.

Kristin TYTGAT donis ekzemplojn pri siaj propraj spertoj kaj eĉ pri sia privata vivo. Ŝi estas belga, edziniĝinta al ruso kaj instruas al interpretistoj por eŭropaj institucioj.

Ŝi parolis pri sia praktiko de kunlaboro en internaciaj institucioj. Ŝi mem

travivis spertojn kelkfoje malfacilajn. Ekz., dum unua kunveno de internacia komisiono, en kiu ŝi estis oficiale nomumita por partopreni, la ĉefo de la komisiono deklaris, ke li ne laboras kun virinoj ! Aŭdinte tion, alia membro de la komisiono, el Danlando kaj viro, preskaŭ svene falis. Jen trafa ekzemplo de ŝoko inter kulturoj.

La prelegantino indikis la tri paŝojn por bona komunikado kaj por sukcese vivi kun kulturaj diferencoj : unue, konstato, konsciigo pri la diferencoj ; due, demandoj, interesiĝo pri la diferencoj ; trie, difino de la propra pozicio kaj limoj.

Mi jam sciis ke komunikado estas kompleksa afero. Sed post tiu prelego mi pli bone konsciigis pri tio.



Malfacilas rakonti aŭ skribi pri tiu prelego. Sed mi tiom ĝuis aŭskulti kaj ankaŭ rigardi tiun prelegon kaj la personon, ke mi lasis min porti sen ia antaŭjuĝo, sed kun intereso. Mi tuj decidis ne preni notojn, ĉar ofte tio estus nur vana provo pluki multajn informojn kaj ideojn. Ofte mi ja nur prenas notojn por trudi min sekvi la prelegon kaj ne lasi miajn pensojn promeni en aliaj lokoj ol tiuj de la prelego, sed por sekvi la prelegon de Kristin TYTGAT mi tute ne bezonis trudi mian atenton. Temis pri komunikado, evidente, sed ĉu ankaŭ ne pri filozofio, etiko, etnologio, epistemologio, tekniko de komunikado, scienco, lingvistiko, sociologio, ..., finfine komuniki estas kompleta arto.



Kristin TYTGAT evidente parolas kaj konas multajn lingvojn, scias multon pri lingvoj kaj posedas veran sperton pri internaciaj/interkulturaj rilatoj.

Mi miris pri la altaj kvalitoj de Kristin TYTGAT kaj ties prelego. Tiom da delikateco, da atento pri la maniero komuniki. Tiom da aŭtenta modesteco, kiu rivelas altvaloran personecon. Mi vidis tion ne nur dum la prelego, sed ankaŭ dum la paŭzoj kaj manĝoj. Kristin TYTGAT estas ne nur kompetenta teorie en komunikado, sed ankaŭ en sia maniero aŭskulti, sinteni, paroli, plene da atento, pacienco - ekz. dum la interparolanto malfacile trovas siajn vortojn. Mi konfesas ke mi estis vere interesita. Tiu virino tute povus doni al junuloj la emon por iu profesio aŭ destino.

Kristin TYTGAT bonege regas Esperanton. Kia plezuro aŭskulti tiom inteligentan personon en diversaj fakoj, kiu parolas simple kaj flue. Eĉ ne pri unu vorto de tiu prelego mi dubis koncerne mian komprenon.

Aŭskultante ŝin oni sentas sin iĝi inteligenta, tiom ŝi bone scias meti la ĝustajn vortojn sur aferojn ofte ne simplajn. Ŝi malfermis interesan kampon de sciadoj. Ni esperantistoj bonŝancas havi tiom da eblecoj por nin kulture perfektigi.

Do, nun klaras: sciipovi lingvojn ne sufiĉas por bone komuniki, estas aliaj aspektoj. Tio ankaŭ veras por ni esperantistoj, ĉar la komunikado en Internacia Lingvo ne forviŝas la personecojn kaj la kulturojn el kiuj la interparolantoj originas.

La strebo bone lerni lingvon estas ankaŭ invito lerni kaj atenti pri ĉiuj flankoj de komunikado.

Se mi denove havos la okazon aŭskulti prelegon de Kristin TYTGAT, senhezite mi ĉeestos ĝin. Faru same.

Bernard BEHRA



Al la glata disvolviĝado de la aranĝo kontribuis : Anjo, Ginette, Kristin, Micheline, Simone, Andreo, Bruno, Cyrille, Frédéric, Edmond, Jean-Luc, Roberto. Nia ĉiesa danko iru al ili.

Raportoj de Edmond Ludwig kaj Bernard Behra, fotoj de André Grossmann

25a Printempa Jubilea Semajno Internacia

Familia Renkontiĝo okazinta la
10-17ajn de aprilo 2009
en St. Andreasberg
Germanio, montaro Harz



La ĉi-jara PSI okazis en "Internacia Domo Sunmonto" en Andreasberg, sur Harz-montaro. Tiu vasta domaro estis tute oportuna loko por tiu esperanto-aranĝo kun 186 partoprenantoj. Taŭgaj salanoj, agrabla manĝejo kaj multaj komfortaj ĉambroj troviĝis en diversaj domoj apud vasta tereno. Malgraŭ montara loko kaj jen kaj ankoraŭ spuro de neĝo, nia semajno ĝuis vere printempan veteron plej ofte kun tute blua ĉielo.

Ĝi ja estas ankaŭ familia renkontiĝo, tial pli ol 30 infanoj ĉeestis kaj ĝuis apartajn programojn.

Grand-parte PSI similas al IF, sed kun pli da ekskursoj kaj turismaj programoj en

la posttagmezoj kaj diversaj prelegoj nur en la mateno. Vespere la distraj vesperoj allogis ĉiujn partoprenantojn. Poste la vesperoj plej ofte finiĝis en la knajpo, kie abundis la bierlektoj, lud-eblecoj kaj ĉefe amika etoso.

Ĉi-jare PSI komenciĝis vendrede antaŭ Pasko. Tial jam en la sabato vespere estis aranĝita la Paska Fajro. En la Paska dimanĉo estas tradicio ĉe PSI, ke infanoj serĉu ĉokoladajn ovojn ekstere sur la apuda herbejo. Ĉirkaŭ la domoj, en la arbaro, ruzaj leporoj jam dismetis siajn ovojn. Du grupoj da infanoj, laŭ aĝoj, poste traserĉis ilin kaj plenigis siajn korbetojn. Plenkreskuloj kelkfoje iom amuze kaj komplice ilin sugestis aŭ helpis. Poste, ĉiuj ĉokoladaj ovo estis kunigitaj kaj disdonitaj al ĉiuj infanoj egal-kvante. Deĵorantaj kaj ĉarmaj "leporinoj" prizorgis tion. Tamen jen kaj jen ovo falis en la manojn de eks-infanoj.



La fama Esperanto-urbo Herzberg troviĝas en la proksimeco, je 20 km de Andreasberg. En la apuda vilaĝo Bad Lautenberg Herzberg estis oficiale metitaj paneloj pro la partnereco kun la pola urbo Góra. Krome ĉe la enirejo al la vilaĝo Scharzfeld troviĝas bonveniga Ŝildo en Esperanto.





Unu el la prelegserio nomiĝis "Gazetara laboro", kiun gvidis Alfred Schubert. Stariĝis pluraj demandoj, kiel verki taŭgan artikolon por iu evento rilate al Esperanto aŭ ne, kian foton proponi al la gazetoj por kapti la atenton de la legantoj kaj plej unue de la redaktoro.

La ĉi-apuda foto estis la rezulto de nia komuna kunlaboro kaj interkonsento pri la plej taŭga foto.

Aliaj interesaj prelegoj temis pri vojaĝo al norda Koreio fare de Harald Schicke, pri Kubo kaj ties invito al venonta UK 2010, kiel aktualigi kaj verki tekstojn por Vikipedio.

La sciencaj temoj de Bernard Régis Larue estas ĉiam ege ŝatataj. Ĉi-jare li pre-

legis pri La Suno, pri la aktiveco de nia stelo, pri ĝia funkciado kaj evoluado, kiel ĝia 11-jara ciklo influas nin.

La vetero ankaŭ favoris agrablajn ekskursojn. Per privataj aŭtoj ni veturis al Schulenberg apud la Oker-lago. Malgraŭ iom da konfuzo por trovi la ŝiphavenetojn, ni ĉiuj sukcesis agrable ŝip-ekskursi sur tiu montara artefarita lago en la valo de la rivero Oker.

En St. Andreasberg ni vizitis la arĝento-minejon. Komence la ministoj bezonis 90 minutojn por malsupreniri 800 m per eskalo kaj du horojn por supreniri.

Genia inventaĵo pri moviĝanta ŝtuparo ebligis plirapidigi la subenkaj supren-iron de la ministoj en kaj el la ŝakto.


La distraj vesperoj estis dediĉataj al kulturo kaj muziko.

La plej eminenta estis la humora vespero kun fraŭlino Barlaston. Anglino, oper-kantistino kaj humorplena en bonega Esperanto.

Tiam ne estis permesita foti, tial jen foto pri ŝi el la reto.

En la jubilea tago estas ankaŭ organizita danc-vespero, sed kun iom tro da diskoteka muziko. Entute estis vere agrabla semajno en internacia kaj amika etoso en taŭga montara loko.

Venontjare PSI okazos samloke de la 2-a ĝis la 9-a de aprilo 2010.



André Grossmann



NACIA INTER-ASOCIA KONGRESO DE ESPERANTO FRANCIO

okazinta de la 7-a ĝis la 11-a de majo
2009 en la bela urbo Troyes en la
regiono Ĉampanjo-Ardeno.

Raportas Liba Gabalda



Kun la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ni konatiĝis tuj post la alveno, jaŭde posttagmeze pere de filmo kaj dumsemaĵne ni promenis tra ties malnova kvartalo. La kongreso estis organizita de la loka grupo Esperanto 10 kunlabore kun Esperanto France. La aranĝon partoprenis pli ol cent geesperantistoj el la tuta Francio. Venis ankaŭ samideanoj el Germanio, Luksemburgio kaj Belgio. La saman vesperon ĉiuj ĉeestantaj asocioj kaj kluboj prezentis sian agadon dum la Asocia foiro.

La programo estis riĉenhava. Vendrede matene okazis la oficiala malfermo kun la ĉeesto de la vicurbestro kaj post la festparoladoj kaj ne tro longa prelego pri tridekjara ekzisto de la revuo *Monato* ni estis invititaj al honora vin-tostado okaze de la 30-jara ek-



Ĉe la tablo de *Espéranto-France* Est deĵoras Simone, Jacques kaj Simone.

zisto de la E-klubo en Troyes.

Okazis pluraj interesaj prelegoj, laborkunsidoj, diskutrondo kiel efike informi kaj varbi por Esperanto kaj ankaŭ E-ekzamenoj. Ni estis informitaj pri *Ipernity*, pri *Skajpo*, pri Esperanto-literaturo kaj povis ĉeesti aliajn allogajn programerojn.



Ĉe honorvino

Dum tiu kvintaga restado en Troyes ni multe vojaĝis tra la mondo pere de bildprezentoj. En Mezameriko ni admiris Gvatemalon kaj Kostarikon kaj ties indiĝenan popolon, en Sudameriko ekzotikan Venezuelon, en Afriko renkonton kun esperantistoj en Benino dum la ILEI-konferenco en 2008. En Eŭropo ni povis sekvi gajajn renkontojn inter geesperantistoj en germana Darmstadt, nederlanda Alkmaar kaj franca Troyes dum la ĝemelurbaj vizitoj.

Vespere ni aŭskultis koncerton de la pariza hiphop-grupo *Pafklik*, kiu rapis en Esperanto. Ni spektis teatraĵojn de *La Tuluza Teatra Trupo*. La lastan tagon koncertis la koruso *Kantilie* formita antaŭ nelonge kun aldonaj surlokaj kantŝatantoj. Ne mankis impona bankedo kaj balo dum kiuj ĉiuj bone amuziĝis dancante ĝis noktomezo.

La tuttaga ekskurso estis riĉa je vidindaĵoj. Unue ni vizitis kristal-fabrikon en Bayel kaj vidis kiel oni produktas kaj mane prilaboras kristalajn objektojn por luksaj magazenoj. Sekvis apetit-veka tagmanĝo en ĉarma restoracio kaj vizito al la kastelo *Cirey sur Blaise*, kie vivis dum kelkaj jaroj la franca poeto, filozofo kaj teatro-verkisto *Voltaire*. Ĉefe admirinda estis malgranda teatro instalita sub la tegmentejo de la kastelo. La ekskurson ni finis per vizito al ĉampankelo de la vinproduktisto *Drappier* kaj gustumis kelkajn specojn de ĉampano.

Bonan sukceson oni havis ĉe ĵurnalistoj. Pri Esperanto kaj pri nia aktivado dum la kongreso aperis tri tutpaĝaj artikoloj en la loka gazeto "*Libération Champagne*" kaj ankaŭ la loka televido raportis pri la evento.

La kongreso disvolviĝis en bona etoso kaj estis bone organizita. Dankon al ĉiuj organizantoj. La venonta okazos en la germana *Kaiserslautern*.



Prelego

Antaŭ kastelo *Cirey sur Blaise*



Fotoj *Andreo*

Partopreno en la manifestacio de la eŭropa monato



Sabate la 9an de majo, dum la manifestacioj organizitaj de la nancia Urbo, pri la "eŭropa monato", la asocio *Esperanto-Nancy 54* budis sur la placo Maginot, de la 9^a ĝis la 18^a, laŭ la temo "*Une langue équitable pour communiquer*".

Paneloj informis pri :

- *la lingvoj en la eŭropaj instancoj* (la diversaj eŭropaj instancoj, la oficialaj lingvoj en Eŭropa Unio, la lingvaj leĝaroj kaj iliaj aplikadoj, la lingvaj servoj : intepretado kaj tradukado, Esperanto en la eŭropa parlamento)
- *la lingvoj en la lernejoj* (la instruado de alilandaj lingvoj, la diverseco de la instruataj lingvoj en UE, la instruado de lingvoj, kiel publika politiko aŭ raporto GRIN, evoluado de la lernado de alilandaj lingvoj, karakteristikoj de esperanto, justa lingvo)
- *la lingvoj en la ĉiutaga vivo de la eŭropanoj* (la oficialaj lingvoj de la eŭropaj

landoj, lingvoj kaj ekonomia vivo, lingvoj kaj amasinformilo, lingvoj kaj inter-reto, renkontoj kaj vojaĝoj per esperanto).

Ludoj estis proponitaj al la multaj pasantoj, el kiuj iom da haltis. Puzloj pri bestnomoj tradukitaj en la kvar lingvoj de la landoj, fondintaj Eŭropon kaj en esperanto, montris la simplecon de la esperanta terminaro.

Flugfolioj diskonigis kaj interesaj diskutadoj okazis kun preterirantoj, kelkaj malfavoraj, sed multaj akceptemaj al la ideo de justa lingvo.

Al **demandareto**, kopiita de tiu, kiun realigilis la norda federacio, la haltantoj tiel respondis al la tri demandoj :

- Unua demando : *Ĉi vi scias kio estas esperanto ?* **jes 35, ne 7**

- Dua demando : *Kiel vi aŭdis pri ĝi ?*

-Familio aŭ amikoj : 11

-Amasinformiloj : 9

-Aliaj : 15

- Tria demando : *Ĉu vi opinias, ke la UE devus konigi esperanton ?* **Jes 26, Ne 4, Hezitema 6, Sen opinio 6**

Ĵurnalisto de *Radio Jéricho* faris **intervjuon** dum ĉirkaŭ 15 minutoj.

Ĉirkaŭ la 10^a, Sinjorino Denry (servo de la internaciaj rilatoj) kaj Sinjoro Berlémont (vicurbestro, delegito al la eŭropaj, internaciaj kaj translimaj rilatoj) vizitis nian budon.



Partopreno en kvartala festo

En *Vandoeuvre*, sabate la 16an de majo, ni enpartoprenis *kvartalan feston "Récréanim"*, organizitan de la junuldomo "*Nomade*".

La infanoj devis viziti ĉiujn budojn por ludi kaj gajni multe da poentoj. Ni prezentis kartludon kaj puzlojn pri la lingvoj.

Helpe de esperanto, la infanoj, komplezure reordigis ŝafarojn kaj bovarojn en franca, germana, itala kaj nederlanda lingvoj. Kelkaj ludis plurfoje, por malkovri ĉiujn ludojn.

Ĉiuj pasis agrablan posttagmezon.



... de "la Zamenhof-strato" al "la rue Zamenhof" ... aù la multfaceta "aventuro" de traduk-entrepreno !



Temas ja pri granda epopeo, kiu ekis en 2005, kiam Spomenka Ŝtimec¹ petis min traduki... "La libro ekzistas en pluraj lingvoj, kaj Etsuo Miyoshi² jam plurfoje pagis la eldonon". Kial miaj oreloj komprenas "pagas" anstataŭ "pagis", tio restas mistero. "Ne gravas la mono, replikas mi, traduko estas longa, peniga laboro, kaj mi povas traduki nur kiam libron mi ŝatas... - Ĝin vi ŝatas !"

La afero dormas, ĝis kiam mi gastigis Grazina Opulskiene³ dum turneo, kaj ricevis donace la aluditan verkon. "Ĝin mi ŝategas, sed eble mi ne estas objektiva, ĉar la aŭtoro Roman Dobrzynsky⁴ estas amiko. Nu, vi devas traduki ĝin... Mi esperas, ke vi tradukos ĝin !". La destino denove donis signon.

Mi legas la du unuajn ĉapitrojn kun granda entuziasmo, la sekvajn kun malpli da intereso, ĉar mi jam aprezis "L'homme qui a défié Babel" de Centassi-Masson, "la vivo de Zamenhof" de Edmond Privat kaj "La Danĝera Lingvo" de Ulriĉ Lins. Certe, tiuj ĉapitroj tria kaj kvara nutras la intereson de personoj, kiuj nenion scias pri la nasko de la lingvo.

Nenion mi tradukis ĝis la Universala Kongreso de Vilnius, dum kiu okazas kunveno de verkistoj kun legantoj. Por emfazi pri "La Zamenhof-Strato" ĉeestas Spomenka, Roman... kaj Louis-Christophe, kiuj elvokas la jam interesan kvanton da tradukoj. Ĉe la fino de la paroladoj Spomenka anoncas "... Ankaŭ franca traduko okazos, kaj ĝin prizorgos Ginette Martin !". Ĝenerala aplaŭdo... Ve ! Mi ne plu povos rezigni, mi perdis mian honron !

Unu monaton poste, jen vizito de agema samideanino Catherine Roux, kiu pro faka handikapo devige sed plezure sidas ĉe komputilo. Mi poponas komencon de traduko, kaj kunlabore, ni atingas preskaŭ la finon de la unua ĉapitro. Je tiu etapo mi konvinkigis, ke la tasko estas farebla eĉ agrabla, sed ke elpantojn mi bezonas. Sekvas peto sur la ret-listojn de UFE kaj de JEFO, kaj mirakle ses entuziasmoj pozitive reagis, la tradukendan libron ili jam posedas. Dank' al ili iĝas bela aventuro de interhelpo. Pli poste, dum momento de malkuraĝo, miaj pensoj iras al tiuj gravaj helpantoj ŝvitantaj sur la tasko kaj mine plu kapablas elrevigi ilin.... Ĝis la fino mi pluiru !

Komence, la propran helpon de Louis-Christophe mi pensis peti je la fino de la traduko, sed ĉe la dua ĉapitro evidentiĝas, ke lin ni tre bezonas por proponi la taŭgajn teknikajn terminojn en esperanto pri betono, kaj cetere pro diskutoj koncerne la uzon de la pronomoj *tu* aŭ *vous*... Mi proponas al li la duan ĉapitron sub ambaŭ formoj, kaj li sciigas sian preferon al uzo de *vous*... Jen problemo solvita.

Ek de nun ni funkcias laŭ tiu maniero: je la fino de iu ĉapitro, ĝin mi rekontrolas kaj okazas pluraj ir- kaj revenoj inter Louis-Christophe, Godeleine Logez kaj mi. Tiam, la rezulto atingas ĉiujn helpantojn, kiuj ĝenerale akceptas la ĉapitron en la stato.

Vi eble surpriziĝos dum legado, ne konscii, ke temas pri tasko de ses malsamaj tradukintoj. Tion klarigas la fakto, ke la skipo same fidelis je la frazoj de Roman Dobrzynski, eĉ kelkfoje

tro "gluiĝe...".

Finfine, post unu jaro pretis la baza traduko. Pro rezigno de Etsuo Miyoshi pri financo de la eldono kaj esploro de Axel Rousseau pri memeldono, post peto de Louis-Christophe, pri elekto de "vera eldonisto", mi ne suspektis, ke ni estis je la sojlo de infero !...

Kelkajn paĝojn mi sendas al la firmaoj "Autrement" kaj "L'Harmattan"⁵. La unua rapide esprimas ĝentilan ifuzon, la dua petas la tutan paperan tapuskripton sed sen promeso eldoni... Je mia demando, ili sciigas sian preferon atendi pli fajngigitan verkon... La tutan vintron mi do dediĉos al serioza polurado kaj printempe sendos la dokumenton. Ve, nenia reago. Post insista demando miaflanke, oni anoncas baldaŭan alvenon de "dokumento"... Nenio atingos min dum kelkaj monatoj, kaj J.-L. Texier, informita dum la kongreso de Bourg-en-Bresse, proponas interveni ĉe "L'Harmattan". Ĉifoje mi iĝas pli prema je la eldonisto, kiu informas, sen promeso de presado aŭ eldono, ke necesas sendi perfektan verkon por eventuala presado. Mi petas rendezuon por J.-L. Texier, evento kiu kvazaŭ fiaskas, ĉar la tiama responsulo informas, ke la libro estas tro ampleksa... kaj iĝos neniam vendebla ! Plie, li mem povus perdi sian postenon de konsilanto, se li metus la firmaon sur maltaŭgan vojon !...

Ginette MARTIN (sekvota)

1 Spomenka Ŝtimec (1949) : Kroatino – konata verkistino en Esperantio: romano, novelaroj, vojaĝhopiskribaj rakontoj – Ginette Martin tradukis franclingven "Kroata Milito Noktlibro".


2 Etsuo Miyoshi (1939) - Japanao - famiĝis pro invento de iu baston-valizo , kies vendprofito ebligas al li promocii Eperanton, kiun li taksas "elektita vivcelo". - Dank' al lia helpo aperis 15-foje tutpaĝon pri Eo en gravaj gazetoj de 13 landoj. (foto)

3 Grazina Opulskiene - Litovano - bibliotekistino - vojaĝoj « eksteren » por diskonigi sian landon

4 Roman Dobrzynsky - Polo - produktis aron da dokumentaj filmoj en Eo – iniciatis longan intervjuon de L-L Zamenhof, ku aperis sub la titolo "La strato Zamenhof" (foto)

5 L'Harmattan – franca eldon-firmao - ĝi aperigis "L'homme qui a défié Babel", verko aludita en tiu-ĉi artikolo.

réinsertion...



et espéranto

Réinsertion et Espéranto

chez **Mraihy Zohra**

3 place Watteau

30900 Nîmes

tel :06.16.46.64.52

reinsertionetesperanto@gmail.com

Nîmes, le 25 mai 2009

Chèr(e) adhérent(e) et généreux donateur (-trice),

L'association **Réinsertion et Espéranto** poursuit son action avec une nouvelle équipe dont voici les noms : *Mme Demongeot Claudie* (présidente), *Mr Allandrieu Robert* (trésorier), *Mr Schneider Jean-Pierre* (secrétaire et gestionnaire du libro-servo).

Zohra Mraihy est salariée de l'association depuis 2000 et fait un travail remarquable, aussi bien en matière du développement de l'espéranto que dans le domaine du soutien scolaire auprès d'enfants. Son emploi, qui est un contrat de type "emploi jeune" n'est plus depuis février 2009. Il nous faut donc trouver 2100 € par mois pour financer son salaire, charges comprises. Les dons sont les bienvenus. Nous vous en remercions par avance. Vous pouvez nous aider par divers moyens :

- faire un don mensuel (par chèque, virement, prélèvement ou paypal),
- participer à nos stages ou à nos cours,
- acheter du matériel pédagogique, des livres, des tee-shirts...
- parler de notre action en faveur de l'espéranto.

Nous sommes dans une nouvelle dynamique, qui consiste à rétablir les liens avec les diverses associations de la région. A présent, membre de la *Fédération Languedoc-Roussillon*, nous avons participé à sa dernière assemblée générale à *Lezignan-Corbières*, le 18 avril 2009. Nous avons organisé les examens d'espéranto des 1^{er} et 2^{ème} degrés lors du stage de Sète, fin août 2008. Nous y avons également proposé notre libro-servo.

Nous envisageons de nous orienter vers l'édition. Bientôt paraîtra : "*Exerçons-nous !*": Ce manuel vous permettra d'évaluer et d'approfondir vos connaissances à l'aide d'exercices et de leur corrigé.

Vous souhaitez devenir membre de l'association Réinsertion et Espéranto ou nous soutenir : contactez-nous !

Les personnes souhaitant recevoir nos informations par courriel sont invitées à nous faire parvenir leur adresse Internet.

Nous restons à votre disposition pour plus d'informations et vous remercions de la confiance que vous nous témoignez.

Pour l'association,
Claudie Demongeot,
Présidente

à détacher et à faire parvenir à l'adresse de l'association

Je soussigné(e), nom : prénom :

adresse :

.....

souhaite : faire un don à l'ordre de *Réinsertion et Esperanto*
participer par prélèvement mensuel sur ccp n°6212 27 T centre de Montpellier
payer ma cotisation annuelle (20€)

signature :
le

La angulo de la komitatano de *Espéranto-France*

Okazis nacia kongreso en Troyes inter la 7an kaj la 10an de majo 2009. Ĝi estas kerna momento por la vivo de la asocioj kiuj partoprenas, kaj ĉefe Esperanto-France. La unua laborkunveno, pri la interfederacia konferenco provis plibonigi la rilatojn inter la regionoj.

La dua temis pri la strategio de Esperanto-France. Oni parolis pri la 3 pilieroj

- informado al ekstera mondo
- instruado
- utiligado

Ĝi fakte estis ĉefe interŝanĝo de spertoj, kiam mi malfrue alvenis, kaj mi profitis la okazon por klarigi nian **strategion pri turismo kaj allogo de eksterlandanoj al**

orienta francio.

Dum la unua komitatkunveno, evidentis, ke la ĉeestantoj de la laborgrupo ne tute respiegulas ĉiujn esperantistojn. Oni tre verŝajne relanĉos enketon por skizi tion, kion postulas la membroj kaj ne membroj.

La ĝenerala asembleo okazis la 9an de majo kun prezentoj kaj agadoj. Mi profitis la okazon por prezenti la rezultojn de la opini-esploro okazinta inter la 7an de februaro kaj la 21an de marto : **duono de la loĝantaro** jam audis pri Esperanto. Vi trovos pli da detaloj en posta artikolo.

Oni anoncis kelkajn gravajn informojn : **la venonta nacia kongreso** okazos en *Kaiserslautern (D)* en 2010, dum la pentekosta semajnfino, kaj la 2011a okazos en *Languedoc-Roussillon*. Ĉu kongreso en nia regiono en 2012 ?

Sekvis demandoj kaj respondoj de la estraro. Inter la plej gravaj, ni povas listi :

- por esti videblaj, *indas enŝovi sin en alies eventojn* (sperto de Renée Triolle),
- por okazigi lokajn rezultoj, *necesas lokaj aktivuloj* substrekis François Lo Jacomo, kaj li petas artikolojn, kiuj prezentas la plej elstarajn rezultojn,
- *prelegvojaĝoj* estas tre taŭgaj por aktivigi internon kaj eksteron de la movado (Claude Nourmont)
- Xavier Godivier memorigis, ke la kontrakto inter UFE kaj nia federacio estas disdono de la decid-povo al nia federacio, kaj ne la malo. La kialo estas tutsimple, ke UFE volas scii, kion deziras la esperantistoj kaj la kluboj,
- ni devas *plialtigi la nivelon* de la instruantoj.

Dum la dua komitatkunveno, la diskutoj celis precizigon de tiuj celoj. La komitato interkonsentis pri mia proponita celo pri eksteraj rilatoj. Ĝi estas vortumita jene :

- ni strebas al : « *Post 5 jarojn, 75 % de la loĝantaro jam aŭdis pri Esperanto* ». Indas nun trovi manierojn por montri Esperanton en la socia medio, la amaskomunikiloj, la lernejoj ktp ktp...
- ni okazigu debaton ĉe GEE por *modernigi niajn lernolibrojn*,
- ni okazigu *3 staĝojn dum la jaro* por instruantoj (en nia regiono, ĝi jam okazis fine de marto, se vi bone memoras. Mi verkos artikolon pri tiu sperto).

Por mezuri la efikojn pri eksteraj rilatoj, ni aperigos artikolojn per la TTTejo <http://esperanto-france.org/>. Ĉiu klubo sendu siajn pruvilojn al mi, kaj mi elektos la plej gravajn.

Kelkaj komitatanoj ŝanĝiĝis. *Eliris François Bartsch kaj Claude Nourmont* post longaj kaj fruktodonaj jaroj. Envenis *Sébastien Montagne kaj Axel Rousseau*.

Ankaŭ la estraro ŝanĝiĝis :

- *Xavier Dewidehem* plu prezidas
- *Aleks Kadar* plu kasistumas
- *Axel Rousseau* estos vi-prezidanto pri kulturo
- mi plu estos vic-prezidanto pri eksteraj rilatoj kaj informado
- *Armelle Piolat* plu estas estrarano

Evidentas la manko de sekretario. Oni devas konfesi, ke *la laborŝarĝo por la estraranoj de UFE estas granda*, kaj tio certe ne instigas bonvenigon de novaj kandidatoj. Ankaŭ tute evidentas, ke ne nur la estraranoj devas labori en tiu asocio. La dua komitatkunveno estis streĉa pro tio.

Mi do alvokas aktivulojn en niaj regionoj, konsideru partoprenon en la komitato kaj eble en la estraro. Ju pli ni estos, des pli facile oni povos gvidi la nacian agadon.

Cyril Hurstel

Kontaktu min ĉe numero 0950 57 68 00

Via reprezentanto en la komitato,
Vic-prezidanto pri eksteraj rilatoj kaj informado,
Sekretario de Esperanto-Strasbourg,
ŝarĝita eĉ de kelkaj kromaj taskoj.

Nia komitatano ĉe Esperanto-France proponas...

"Lonely planet" (en la angla), kial ne "Plenplena planedo" ?...

"... Kial ne, karaj membroj de la federacio ? Mi celas lokajn grupojn.

Jen mia propono pri agado kadre de la strategio « *Ni utiligu Esperanton kaj montru ĝin* ».

Tiu strategio baziĝas sur lokaj grupoj je federacia nivelo. Kion tio signifas ? Tio signifas, ke loka grupo agu surloke kaj riĉigu la valoron de sia agado, dank'al streboj de la aliaj grupoj. Se izolita grupo allogas eksterlandanojn al sia urbo, ne multaj venos. La sama agado, ĉirkaŭata de samspecaj agaderoj de proksimaj kluboj, havas tute alian valoron. Multe pli da vojaĝantoj oni povas allogi per reto da vidindaĵoj, kiuj ebligas iradon de unu punkto al la sekvonta. Cirkvito havas tute alian valoron ol punktetoj. Anstataŭ vojaĝi por malkovri kasteleton aŭ muzeeton, samideanoj ĝuu tutan vojaĝon en Esperantio.

Kiel kune agadi tiucele ?

La unua paŝo : Vi verku tekston, kiu povas helpi turistojn memviziti viajn plej interesajn lokojn. Kelkaj jam ekzistas en nia regiono, inter ili la sekvaj :

- la vizito de *la katedralo de Strasbourg*,
- priskriboj de *skulptaĵoj en la arbaro de Haguenau*, verkitaj de *Odette Scheidel*,
- *la kastelo Kagenfels*, kun traduko de la oficiala historio,
- *la kastelo Haut-Koenigsbourg*, pro la vizito okazinta en 2007,
- *Bar-le-duc*, kvartalo « *Renaissance* » verkita de Pol Denis
- *Nancy*, pro la faldfolio eldonita de la turista oficejo
- *Datumbazo pri gastoĉambroj* tradukita antaŭ kelkaj jaroj

Eble vi malkovras tiujn valorojn ? Eble eĉ ekzistas aliaj, kiujn mi ne konas. Estas kompreneble malfacile trovi disajn aferojn, do imagu la malfacilon por vojaĝonta vizitanto.

La dua paŝo : Ni surbendigu plej eble da elementoj por proponi *son-dosierojn*. Ili estas facile elŝuteblaj tra inter-reto kaj ili estas facile porteblaj surloke, per *mp3-aŭskultilo*. Por aŭskulti ekzemplojn, vi elŝutu la densigitajn mp3 :

- <http://benecyril.free.fr/spip.php?article48>
- *dosiero K9.mp3* en tiu densigita <http://esperantostrasbourg.free.fr/dokumentoj/shipoj/sonoj.zip> (Atentu ĝi estas peza)
- <http://kielfarasaliaj.free.fr/bar/>

Maldensiginte, vi trovos aron da *mp3-aj dosieroj*, kiujn vi povas aŭskulti. Evidente, estus pli bone promeni surloke. Imagu la utilon por turisto. Ni ne ĉiam havas tempon por daŭre akompani ilin. Tiel ili profitas nian sperton kaj ni ŝparas tempon por babili dum la vesperoj.

Se vi aŭskultas ĉiujn ekzemplojn, vi rimarkos la pliboniĝon de la kvalito. Kulpas antaŭ-amplifilo, kiun mi ĵus aĉetis. Se vi zorge preparas viziton de via urbo, kun tekstoj kaj printebla mapo, mi ĝoje surbendigis la voĉojn por aldoni la tuton al sekvanta paŝo.

La tria paŝo : Jam ekzistas <http://www.gvidilo.org/> por arigi turistajn informojn. Tamen, ne ĉiuj konas ĝin, kaj la aferoj restas disaj. Homoj kutime preferas vojaĝi kun libro ol kun poŝtelefono konektita al interreto en la mano. Por valorigi la disajn elementojn, mi proponas al vi kunigi ĉiujn niajn elementojn en elŝuteblan libron. Ĝi fariĝos ĝermo de nova speco de « *Lonely planet* » : Planedo plenplena de esperantistoj. Tiu libro fariĝos adekvata kunulo de *Pasporta Servo* por nia regiono. Pro tio temas pri federacia projekto.

La kvara paŝo : Kun ambaŭ libroj eksterlandanoj estos allogataj al malkovro de nia regiono. Ilia ĉeesto helpos vin vigligi viajn klubajn kunvenojn, viajn lokajn eventojn kaj kreskigi la valoron de via agado. Ju pli valora, des pli facile vi konvinkos novajn lokajn lernantojn. Tiam ni havos pli da gastigantoj, do pli da vizitantoj, kaj konsekvence pli da artikoloj en la gazetoj. Virta cirklo... "

La " *historio de nia federacio* " estas daŭre konsultebla per la reto, kaj eĉ novaj paĝoj aldoniĝis. Fakte ĝi troviĝas en 2 retejoj, la malnova prizorgita de François-Xavier Gilbert kaj la nova, kiun kreis nia kasisto André, kaj kiun li okaze aktualigas.

Konkrete eblas vidi ilin per:

<http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>

<http://esperanto.alsacelorraine.neuf.fr> kaj poste alklaki (maldekstre) *histoire d'Espéranto France-Est*,

kaj la malnova retejo sen aktualigo :

<http://membres.lycos.fr/historio>


Ni memevidente memoras la gravan laboron de Jean.-Paul Colnot, al kiu ni ŝuldas ampleksan dokumentaron kaj ni denove dankas lian edzinon Micheline, kiu disponigis grandan kvanton da fotoj.



al Aleksander Korĵenkov

"Oni ja observas, ke Esperanto allogas parton de tiuj "antiglobalistoj", kiuj malŝatas Usonon kaj la anglan lingvon, kaj ili estas pli laŭtemaj, maldekstremaj, verkemaj kaj surpodi-igemaj ol la samideanoj, por kiuj Esperanto estas nek mondsavilo, nek batalilo kontraŭ (ne nur lingva) imperiismo, sed nur agrabla tempopasigilo, librolingvo, edz-peranto k. s. - resume, "nobla hobia" sen politika dimensio".

... / ...



Dankon al Aleksander pro la interesaj aludoj al Zamenhof. Renato jam publike uzis tiun belan fragmenton en unu el siaj prelegoj ("kun tia Esperanto..."). Mi tamen volus fari kelkajn rimarkojn, ne direktitajn kontraŭ vin, sed koncerne al la ne-informita antaŭjuĝa "komuna prudento", kiun vi trafe resumis:

1 - La termino "antiglobalisto" estas komplete misgvida kaj mistrakta, eĉ se vaste uzata de la ĵurnalistoj subtenantaj la nunan sociordon kaj ĝiajn terurajn maljustojn. Mi mem kontribuis al *La Ondo de Esperanto* per artikolo pri la potenciala rolo de nia

lingvo eĉ la bunta movado el sociaj movadoj, kiu strebas al alternativa tutmondiĝo.

Ĝi estas do **alimondisma**, ne "antiglobalisma", ĉar ĝi agadas ne subtene al ia absurda reveno al la pasinteco de izolitaj nacioj, sed male **por tutmonda solidareco** inter la homoj, bazita sur principoj de partoprena demokratio, socia justeco, homaj rajtoj, daŭropova evoluo, paco, ktp.

2 - Resumi per la aplomba diraĵo, ke oni "malŝatas Usonon kaj la anglan lingvon" estas ne nur ekstreme pigra intelekto sed fakte krude distorda. Kiel milfoje klarigite, la problemo ne estas la lando nek ĝia popolo, kiujn ekzemple mi mem multe ŝatas, sed la danĝera, perfortema kaj intrudema ekstera politiko de ĝia registaro, milite subtena al la profito-ŝancoj de la mega-korporacioj, eĉ kontraŭ la konveno de la usona popolo mem.

La ĵusa elekto de nova ŝtatprezidanto en tiu giganta lando ĝuste naskas esperojn je pozitiva ŝanĝo de la rolo kaj bildo de tiu lando en la mondo. Jam estas tede esti devigata ankoraŭfoje ripeti ke, almenaŭ mialflanke, estas nenio kontraŭ la angla lingvo en si mem, kiu ja estas (samkiel ĉiu alia) plene respektinda, sed jes ja kontraŭ la aktiva lingvo-mortigado, kiun la nuna monda lingvo-sistemo rapide okazigas, aparte kontraŭ la lingvoj de malfortaj, subpremataj socioj. La segmentoj de la E-movado, kiuj komprenas kaj emfazas la valoron de la lingva diverseco kaj lingva ekologio ne batalas kontraŭ la angla lingvo, sed por la lingvoj, ĉiuj lingvoj.

3 - Mi ja defendas la karakteron de nobla ŝat-okupo sen ajna kroma implico, kiun Esperanta havis kaj havas por pluraj homoj. Mi opinias, ke la pluralisma aliro al Esperanto estas tute rajta kaj prava, ĉar tia estas la realo mem de nia movado. Ĉiu homo povas mem kundividi diversajn motivojn aliĝi kaj resti lojala al Esperantujo, do ĝui la ŝancojn havi amikojn en aliaj landoj, kaj samtempe ligi esperanton al siaj porpacaj idealoj, ktp.

Amike,
José Antonio Vergara

... - iste ? ... - one ? ni klare informu !...



Le suffixe "-iste" risque d'évoquer pour certaines personnes une "doctrine" ou un "hobby" comme "philatéliste".

Que pensent les non-espérantophones qui lisent "association espérantiste" ?...

N'oublions pas que beaucoup d'entre eux n'ont jamais entendu le mot "espéranto", c'est donc comme s'ils lisaient quelque chose comme "association ipulatiste"... A quoi rattacher ce mot ?... doctrine (eugéniste, orléaniste, etc...), religion (talmudiste, anabaptiste, etc...), profession (journaliste, urgentiste, visagiste, etc...), passe-temps (touriste, cruciverbiste, philatéliste), utilisateur d'un instrument de musique (cithariste, cymbaliste, etc...) ou autre (fantaisiste, absentéiste etc...) ?

En revanche, si on utilise le mot "espérantophone", le lecteur/interlocuteur conçoit instantanément qu'il s'agit d'une langue.

Voir le texte "ESPÉRANTISTE - ESPÉRANTOPHONE – ESPÉRANTOPHILE" de Germain Pirilot.

<http://www.angelfire.com/ny2/ts/pirilot.html>

et par exemple pour le néerlandais, le commentaire de Paul Peeraerts:

... En la nederlanda ekzistas la sama distingo: "esperantist", kio ofte havas malbonan kromsignifon, kaj "Esperantospreker", la persono, kiu uzas la lingvon.

FHYPERLINK ["http://www.ipernity.com/blog/30525/108388/comment/3674304"](http://www.ipernity.com/blog/30525/108388/comment/3674304)

Thierry Salomon ("Ripetiĝantaj fuŝoj en la informado pri Esperanto")

<http://www.angelfire.com/ny2/ts/ripetighantajfushoj.html>



"Internacia Virina Tago" 2009

"... Karaj gesamideanoj,



249 mesaĝojn el 66 landoj por la Internacia Virina Tago de UN 2009 ni ricevis ĝis limdato, kiel ĉi sube:

Albanio 2/ Armenio 1/ Aŭstrio 3/ Aŭstralio 3/ Barato 2/ Belgio 16/ Benino 1/ Brazilo 9/ Britio 2/ Bulgario 3/ Ĉeĥio 4/ Ĉilio 1/ Ĉinio 6/ Danio 1/ Ekvadoro 1/ Estonio 2/ Finnlando 4/ **Francio 56**/ Germanio 13/ Grekio 1/ Gvatemalo 2/ Hispanio 5/ Hungario 10/ Irano 1/ Irlando 1/ Islando 2/ Israelo 4/ Italio 14/ Kanado 2/ Konga Respubliko 2/ Koreio 4/ Kostariko 1/ Kroatio 1/ Kubo 3/ Latvio 1/ Litovio 1/ Luksemburgio 1/ Madagaskaro 1/ Malio 1/ Malto 1/ Meksiko 2/ Nederlando 4/ Nepalo 2/ Niĝerio 1/ Norvegio 1/ Novzelando 1/ Pakistano 1/ Pollando 6/ Portugalio 1/ Rumanio 3/ Rusio 6/ Salvadoro 1/ Serbio 3/ Slovenio 2/ Sudafriko 1/ Svedio 5/ Svisio 4/ Tanzanio 2/ Taĝikio 1/ Togolando 1/ Ukrainio 2/ Urugvajo 1/ Usono 4/ Uzbekio 1/ Venezuelo 1/ Vjetnamio 2.

Korajn dankojn al vi ĉiuj.

La partoprenantoj miros antaŭ tiom da mesaĝoj el la mondo. Ni pli poste raportos la rezulton al vi karaj".

Taeko OSIOKA, Hiroŝimo, Japanio

Le nombre de messages reçus jusqu'à la date-limite est finalement de 249 de 66 pays, dont **56 pour la France**. Taeko OSIOKA remercie cordialement toutes celles et tous ceux qui ont participé à ce succès. Un compte-rendu sera envoyé ultérieurement.

★ ————— bonvenon al la nova APTE ! ————— ★

(el nia leterkesto)

Saluton!



Mi volas informi vin ke nova asocio , **APTE**, Asocio Poŝto Telekom Esperanto, renoviĝis, en **NANCIO**, la 2an de aprilo 2009.

Mi estas la nova prezidanto, kun S-ro **RODANGE** kaj S-ro **HERLÉ**, de **ESPERANTO FRANCE-EST**.

Antaŭe estis S-ino **COQUISART**, kiu ek-renovigis la asocion, pli antaŭe estis S-ro **COLNEY**, fame konata

Ni estas en rilato kun la internacia **I. P. T. E. A.** (Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio)
Do, faru por ni larĝan informon, enskribu nin en via gazeto !!

Tutamike!

Alano

A.P.T.E COLLIGNON Alain, 20, rue Aristide BRIAND, 54000 NANCY

03 83 40 35 60 - 06 33 06 11 03



Prov-ekzempleroj por viaj lernantoj


Ĉi-tiu numero 146 estas sendita nur al abonantoj de la jaro 2009. Se vi ne renovigis vian abonon por 2009, la numero 145 estis la lasta sendita al vi.

Krome, ĉu viaj gelernantoj konas nian bultenon La Informilo? Ĉu ili abonas ĝin? ankaŭ por 2009?

Ni proponas sendi prov-ekzempleron de venonta numero al viaj gelenantoj, al viaj klubanoj, kiuj ankoraŭ ne konas nian dulingvan bultenon La Informilo, aŭ ankoraŭ ne abonas ĝin. Bonvolu sendi liston de adresoj al nia kasisto: s-ro André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Kompreneble ankaŭ eblas tuj pagi la abonon je 14 eŭroj, same kiel tion entuziasme faras Floréal Gabalda sur la apuda foto.

La kasisto André Grossmann



aperis esperantlingva blogo pri iPhone !

Ĝus naskiĝis kolektiva blogo pri fama produkto de *Apple*.



Kelkaj fanatikuloj kunordigitaj de *Aleksander OSINCEV* (Rusio) prezentas al esperantlingva publiko ĉiujn avantaĝojn de *iPhone* en kelkaj kategorioj: programoj, esperantigo, novaĵoj, plurmedio, diversaj. Oni planas esperantigi *iPhone* kiel eble plej plene, kaj pri tio jam aperis ideoj kaj komenciĝis laboro.

iPhone jam iĝis **internacia poŝtelefono** kun riĉaj funkcioj, do tute logike estus **uzi ankaŭ internacian lingvon** por paroli pri *iPhone* kaj kunlabori internacie por krei ion, kio estos utila por diversaj homoj. Fari tion oni povas nur kune, kaj se vi havas deziron paroli pri via adoraĵo, venu, komentu kaj ĝuu.

Cetere vi povas eniri skipon de aŭtoroj aŭ simple skribi fojfoje artikolojn pri tio, kio vin plej interesas. Blogo estis konstruita sur esperantigita *Wordpress*, ĉiuj gravaj por komunikado kaj funkciado de blogo servoj ankaŭ estas esperantigitaj, do kunlaboro povas funkcii senĝene.

Por nia lingvaĵo estu komprenata, ni kompilis ĝisdatigitan terminokolekton pri *iPhone* kaj malgrandan vortareton kun tiuj terminoj. Ni pretas enlistigi ankaŭ viajn terminojn, kiuj nun mankas. Baldaŭ aperos novaĵoj pri esperanta klavaro kaj esperantlingvaj programoj.

Retadreso de blogo: <http://iphoneo.info>
Aleksandr Osincev alex.osintsev@googlegmail.com

... dans notre rubrique ...

Speaker le french,
c'est has been !



“ ...Kiel eks-instruisto de la rusa lingvo, mi bone scias, ke en Francio estas ĉefe instruata la angla. Eble pro tio kulpas la ministrado. Sed kio devigas friziston, restoracion, agentejon kaj tiel plu doni anglan nomon al sia butikoj ?

Kio devigas instancon (muzeo, turismoficejo, fervojo) uzi la anglan ? Por respondi la bezonojn de la klientoj ?... Ne, pro modo !

Do, ĉu vi intervenas ĉe la uzantoj de la dulingvo por atentigi, ke ili malobeas francan leĝon Toubon ? La Ministro (kaj la deputitoj) deklaras, ke ili respondas la dezirojn de la loĝantaro, kaj ili ne mensogas, sed la kompatinda loĝantaro ne havas ideon pri la vera lingvo-situacio en la mondo. Ĉar oni ne plu tradukas la titolojn de usonaj filmoj en la francan, ĉar oni tuttage aŭdigas muzikon en la angla, ĉar la komputiloj parolas nur angle, la **simpla homo imagas, ke la tuta mondo parolas angle**. Estas la ov-kokina proceso !...

Ni estas kaj estegu tiuj, kiuj pli bone informos ilin. Do ek !...”.

Fotoj kaptitaj en Bar-le-Duc

Renée TRIOLLE

Kanzon-teksto de *Patricia Kaas* tradukita en Esperanton

La oficiala retejo de la franca kantistino enhavas **39 tradukojn** de la kanzono, kiu reprezentis Francujon en la *54a Eŭrovida Kanzonkonkurso* en Moskvo la 16an de majo 2009. **Esperanto** estas unu el la malmultaj lingvoj kun kompleta teksto.



<http://www.patriciakaas.net/eurovision2009> (alklaku LES PAROLES)

La *54a Eŭrovida Kanzonkonkurso* okazis en Moskvo la 12an (unua duonfinalo), 14an (dua duonfinalo) kaj 16an (finalo) de majo 2009 kun la partopreno de 42 landoj. Francujo, kiel unu el la kvar plej gravaj mon-kontribuantoj de la *Eŭropa Radio-televida Unio*, rajtis partopreni rekte en la finalo la 16an de majo.

La produkto-teamo de Patricia Kaas, la fama kantistino, kiu reprezentis Francujon kun la kanzono "*Et s'il fallait le faire*" ("*Kaj se endus fari tion*") decidis, ke ties teksto ne nur estos tradukita en la anglan sed en kiel eble plej multajn lingvojn de la 41 aliaj partoprenontaj landoj. **Plej miriga (kaj salutinda)**

estas la elekto de Esperanto kiel lingvo, en kiun la teksto ankaŭ estas tradukita, kvankam ĝi estas oficiala lingvo de neniu lando : iom post iom, la bildo de nia lingvo ŝanĝiĝas en la ĝenerala publiko...

Mi precizigu, ke *Patricia Kaas* kantis **en la franca lingvo**, ne en Esperanto ! La oficiala retejo aperigas **NUR tradukojn** en plurajn lingvojn kaj NE adaptojn, t.e. versiojn en aliaj lingvoj.

Istvan Ertl

PS – Patricia Kaas lokiĝis je la 8-a rango en la konkurso.

*Kaj se endus fari tion, mi forpelus la vintron
Per printempaj frapegoj kaj longaj helaj matenoj.
Se endus, por plaĉi al vi, mi ĉesigus la tempon,
Por ke ĉiuj viaj hieraŭaj vortoj restu miaj nun.*

*Mi rigardu plu en la bluo de viaj okuloj,
Viaj du manoj plu perdiĝu en miaj haroj.
Mi ĉion pligrandigos, kaj se tio maltroas,
Mi ĉiam malpravos, se tion vi volas...*

*Mi ja volas doni ĉion nur se vi kredas tion,
Mia koro ja volas sangi nur se vi vidas tion,
Ĝis mi iĝos nenio alia ol la ombro de viaj noktoj,
Ĝis mi iĝos nenio alia ol ombro sekvanta vin.*

*Se endus fari tion, mi ĉesigus la Terturniĝon,
Mi estingus la lumon por ke vi restu malveka.
Se endus, por plaĉi al vi, blovigi kontraŭajn ventojn,
En senviva dezerto mi trovus la maron...*

*Kaj se endus fari tion, mi ĉesigus la pluvon,
Ĝi retroiros dum la resto de niaj vivoj.
Se endus, por plaĉi al vi, aŭskulti vin ĉiunokte,
Kiam vi parolas pri amo, ankaŭ mi parolos pri ĝi...*

*Vi rigardu plu en la fundo de miaj okuloj,
Vi tie vidu plu la plej grandan el la fajregoj.
Kaj via mano gluiĝu sur mia haŭto, kie ĝi volas.
Se vi iam forflugos, mi sekvos, se mi povos.*

kontribuas fidela abonantino (Ĉekio)

Homo, ĝis kiam per Amo plenumiĝos via kor',
finiĝos ĉiuj viaj polemikoj kaj la maltrankviloj.

Do, jam haltu kaj ja ĉirkaŭvidu -
kial l'arboj naskas kaj la fiŝoj en riveroj estas?

Por kiu l' ora suno lumas?

Kaj kial la herbejo plenas je florar'?

Por kiu Dio tiom da beleco kreis?

Por la arboj? Por la birdoj? Por ja kiu eble?

Enrigardu vian koron, vi la Hom'!

Cxu vi l' Amon trovos tie? Aŭ ĉu ion eĉ malbonan?

Kial vi ĝin per la hasto, zorgo, timo satigas?

Kie restas loko por la Am'? Por tio, kion sentas vi?

Kial Tero suferegas sub la paŝoj viaj?


Kiom longe ankoraŭ? Monatojn? Jarojn?

Reordigu vian koron kaj plenumu ĝin per l' Am',

Beligu vin per la ridet', ne per la sulk'!


La Amo vin varmigis, malaperos zorgoj viaj,

Ĝi estas ja pli multvalora ol la oro pura.



*Pavel et Moravio
Tradukis Jaci*

Esperanta sintezo de voĉo



Ne ekzistas nun bona sintezilo de voĉo en Esperanto. Tamen mi eksperimentis kun la plej bona nun en la merkato, pola sintezilo *Ivona* - mi enmetis mallongan Esperantan tekston en la demonstran fenestron de *Ivona*, kun pola voĉo *Ewa*, kaj... ĝi legis la tekston preskaŭ senerare, farante erarojn nur tiam, kie ili estis antaŭvideblaj - ĝi moligas "pole" kelkajn literojn kaj legas numerajn valorojn de la ĉapelitaj literoj.

Do, preparo de *Ivona* por Esperanto estus miaopinie tre facila - bedaŭrinde ne mi pri tio decidus :-)

Adreso de la sintezilo *Ivona*:

<http://www.ivona.com/say/1uuHh5Qy>

● News

The new version of IVONA Text-to-Speech has a significantly higher, radio-like sound quality. IVONA voices, including the male Jan and Maja, in their full quality samples, are available for everyone...


more >

Tiam elektu "legantulon" meze (*Ewa* aŭ *Jacek*, ktp) kaj premu la ruĝan butonon "Read" sub la teksto.

laŭ [blogo de Paweł Wimmer] <http://esperantorapide.blogspot.com/2009/04/esperanta-sintezo-de-voco.html>
- pere de *Germain Pirlot*

PS *** eksperimentis la redaktoro de "La Informilo"... Plenkontentigis la rezulto !

... perfekta
devas




Eŭropano
esti ...



kuirema kiel Brito

stiranto kiel Franco



disponebla kiel Belgio



babilema kiel Finnio



humurema kiel Germano



teknikisto kiel Portugalio



fleksebla
kiel Svedo



fama kiel Luksemburgano



pacienca kiel Aŭstro



kontrolebla kiel Italio



sobra kiel Irlandano



humila kiel Hispano



oferema kiel Nederlandano



organizema kiel Greko



diskreta kiel Danio

... ni provu rideti !...



La edzo legante la tag-gazeton... alparolas sian edzinon :

"Ĉu vi scias, ke virinoj uzas 30 000 vortojn ĉiutage kaj viroj nur 15 000 ?
- Facilas tion klari... Necesas dufoje diri la samaĵon al ili , por ke ili pri-aŭskultu..."

Tiam, la edzo , forlasante la gazeto, okulumas al sia edzino:

"Senkulpigon, sed ĉu vi povus ripeti ? "



Iu edzo pridemandas sian edzinon:

"Mi ne komprenas, kiel iu dio povintus naski cin tiom bela sed bedaŭrinde, tiom stulta samtempe..."

- Nu, lasu min klarigi... Bela mi estas por allogi cin, sed stulta por ke mi konsentu daŭre vivi kun ci !"



Ĉe psikoterapiisto...

"Doktoro, mi suferas neelteneblan problemon. Ĉiuvespere, antaŭ enlitiĝi, mi surgeniĝas por verifii, ĉu iu kaŝiĝas sub mia lito... Sed preskaŭ dum la tuta nokto mi spertas saman angoron... Mi kredas, ke mi baldaŭ freneziĝos!"

- Kulpas certe koŝmaro, kiun vi travivis dum la junaĝo. Nu, ni komencu terapion. Vizitu min ĉiu-semajne dum ses monatoj. Ĉiu konsulto kostos ducent eŭrojn.

Ĉu ni eku ?

- Hem... ne tiom rapide, mi unue iom pripensu pri eventuala decido..."

Fakte fiaskas la unua proponita rendevuo, kaj iutage, surstrate, ŝi trafas la specialiston, kiu scivol-emas...

"Jes, mi ŝuldas al vi klarigon... Pri tiu terapio mi informis mian najbaron, kiu tre ŝatas "slojdi"... Li malkovris efikan solvon tute senpagan. Li eniris mian dormo-ĉambbron... kaj for-segis la kvar piedojn de la lito !"

Ĉe kuracisto...

"Ĉu vi multe fumas ?... pridemandas la fakisto al la paciento, kiu plendas pro daŭra tusado.

- Jes, tion mi humile konfesas... Krom dum la periodo kiam gripo kaptas min; tiam mi flanke lasas cigaredojn...

- Do, bone... Ĉi-jare, rezignu pri kontraŭ-gripa vakcinado. Je ia vidpunkto, oni povas dedukti, ke kiam vi suferas... vi pli bonfartas !"



Du amikoj elvokas la homan kredemecon...

"Mi ne komprenas la sintenon de la homoj... Oni informas ilin, ke eblas rondsperflugi la terglobon en duonhoro, ke infano en Pakistano naskiĝis kun kvar oreloj, ke iu Ĉino senprobleme vivas sen dormado, neniu el ili pridubas la asertaĵon ! Sed se oni altroĉis averto-paneleton sur bankon de promenad-parko kun la vortoj "Priatentu, freŝdeponita ŝmirajo", ĉiu preteriranto haltos kaj verifios per fingro, ĉu tio veras !"



Novalveninta apud-loĝanto estas intervjuita far sia najbaro:

"Kial vi neniam edziĝis, kara sinjoro ?

- Nu, vidu... Mi daŭre esploris por malkovri idealan virinon, kaj kiam mi preskaŭ trafis ŝin, siaflanke ŝi ankaŭ klopodis renkonti idealan viron... Vi komprenos, ke la afero ne povis sukcesi !"

Dum jara renkontiĝo de gefraŭloj enpartoprenantaj la tradician tagmanĝon, kelnero alportas al virino etan falditan slipeton, kiun ŝi ne kapablas legi pro forgeso de la okulvitroj. Ŝi kliniĝas al la dekstra gasto por peti helpon...

"Mi estus dankema al vi, se vi legus por mi tion, kiu kuŝas sur tiu bileto..."

- Sed, bonvoleme, sinjorino... Jen:

"...Mia kara Johanino, ne daŭre babilu kun via maldekstra najbaro, prefere vi konversaciuj kun la dekstra... Li ja estas certagrade stulta, sed neimageble monhava !"



Profunde noktigas. Malbonsanca pet-veturanto devas alfronti lacecon kaj viglan fulmo-tondron kun densa pluvofalo.

Finfine li ekvidas veturilon, kiu alproksimiĝas preskaŭ silente kaj malrapide, kaj neatendite haltas.

Li rapide malfermas la dekstran pordon kaj impetas enen...

Ve, okulumante maldekstren, li konstata, ke neniu staras ĉe la stirilo, kvankam la veturilo malrapide reantaŭeniras !

Kaptita je timo, li vidas, ke la aŭtomobilo baldaŭ atingos strat-kurvon...

Li sukcesas bremsi per la helpstango, kaj mano subite aperas tra la ĵus malfermita maldekstra pordo kaj manovras por ne devojiĝi... Ĉiufoje sama interveno je ĉiu strat-kurvo !

Finfine, terurigita, li saltas eksteren, retrokuras sub diluva pluvo kaj atingas kafejon en eta vilaĝo...

Li englutas alkoholaĵon por forpeli sian timon, kaj rakontas sian nekred-eblan spertaĵon...

Duonhoron poste, eniras du uloj, tute trasorbitaj de pluvo, kiuj okulumas al la alveninto... Subite, unu el ambaŭ ekkrias...

"Sed, sed nekredible !... Jen la stultulo, kiu eniris nian veturilon, ne-oportune bremsis, dum ni puŝis ĝin por provi ek-funkciigi la motoron !..."

el nia fototeko



LANDERSEN - 22 / 03 / 2009 - Antje (DE - Furth) ... kaj belga / franca amikeco !



HERZBERG, die Esperanto-Stadt - 28 / 05 = 03 / 06 / 2009 photos André GROSSMANN



Fabien TSCHUDY, ce la listo-kapo, nord-orienta Francio / EDE balotado - intervjuita far France 3 Alsace